



LITERATURA VIVO



Numero 002

Aũgusto 2025

Enhavo

Erika Godo kaj John Huang: Vortoj al la legantoj.....	4
Gratulvorto de Duncan Charters.....	5

Originala prozo

Erika Godo: La unua libro.....	6
--------------------------------	---

Originala poezio

Benoît Philippe: Sep poemoj.....	7
Moissey Bronsteyn: Julia penseto.....	12
Valentin Melnikov: Sonetoj al mia Muzo.....	13
Belulino: La larmoj de mia patrin'.....	17
Erika Godo: La kiso se somero.....	18
Erika Godo: La sekretoj de la rozoj.....	19
John Huang: Voĉlegi La Libron de Poezio.....	20
Lilaketo: Lotusoj.....	21
Lilaketo: Virino en somera robo.....	22
Yohanes Manhitu: Ni iru.....	23
Elena Popova: Haikoj.....	24
Elena Popova: Ruĝa rozo.....	25
Jardanka Miric: Junia suno.....	26
Lenke Szász: Kakto.....	27
Valentin Melnikov: Kanto pri feliĉo.....	28
Paŭlo Nascentes: Poezimistero.....	29
Malekera Bonne Idee: Kvin poemoj.....	30
Maria Nazaré Laroca: Poetiko.....	35
Maria Nazaré Laroca: Teksado.....	36
Kelly Muteke: Vento de l'amo.....	37
Kelly Muteke: Senespera vivo.....	38

Tradukita poezio

Rudina Muharremi Beja: Kiam ploras la steloj (Trad. Bardhyl Adem Selimi).....	39
Shi Yu: Forgesitaj • Kvar Sezonoj (Trad. Ardo).....	41
Anna Turek: Infaneca Ĝojo (Trad. Ryszarda Kwiatkowska).....	42
Zhuang Qixiong: Somero (Trad. Zhuang Qixiong).....	43
Zhuang Nu: Pasioplena rozo (Trad. Yi Qiao).....	44
Wen Jiabao: Rigardante sor la stelplen-ĉielon (Trad. Yi Qiao).....	45
You Xiaogang kaj Han Jingting: Luno, Ho! Mia Lun' (Trad. Batalanto).....	46

Originala novelo

Erika Godó : La malĝoja sekreto de la roko.....	47
Elena Popova : Ĉeriza vetero.....	49
Lenke Szász : La grilo kaj la formiko.....	50
Batalanto : Zhiqing: La Klera Junularo en la Hejmtero de la Marŝalo.....	54
Laimundas Abromas : Pri toleremo.....	57
Rita (Hripsime) Mkrtĉjan : La mondo, kiun ni vidas.....	60
Honoré Sebuoro : Vera amo.....	61
Rita (Hripsime) Mkrtĉjan : Songô.....	63
Yin Jiaxin : Ĝena floropresita robzono.....	64
Nathan Sena : La Domo de la Koro.....	66
Nathan Sena : La Puzlo de Feliĉa Domo.....	67

Originala romano

Yin Jiaxin : Ario de juneco.....	68
--------------------------------------------------	----


Tradukita romano

Pearl S Buck : Vento orienta – Vento okcidenta (4) (Trad. Detlef Karthaus).....	72
Maksim Boĉkarev : Jaga (4) (Trad. Sergei Isakov).....	77

Artikolo kaj eseo


Erika Godo : Interjuvo kun Lilaketo.....	82
Viktorio : Timoj kaj ĝojoj de mia esperanta parolado.....	85
Bjalistoka Esperanto-Societo : La 15-a literatura konkurso Esperanto.....	87

Kovril foto : Abelo kaj floro (foto de John Huang).....	1
---------------------------------------------------------------------------------	---



Aglo (foto de [John Huang](#))

Vortoj al la legantoj



Erika Godo



John Huang

Karaj legantoj! Vi legas la duan numeron de Literatura Vivo. Nia celo estas krei platformon, kie interesiĝantoj pri literaturo povas renkonti la plej novajn verkadojn kaj verkistojn. En nia revuo vi povas legi poemojn, prozojn kaj novelojn kaj intervjuojn kun verkistoj, same kiel helpi kompreni klasikajn verkojn pli profunde. Krome, ni ofertas eblon por verkistoj kaj poetoj montri siajn proprajn verkojn. Aliĝu al ni kaj malkovru kune la mondon de literaturo! Ni atendas viajn rimarkojn kaj sugestojn!

Kun salutoj,

A handwritten signature in cursive script that reads "Erika Godo".

Erika Godo

A handwritten signature in cursive script that reads "John Huang".

John Huang

Retejo: www.literaturavivo.com

Retpoŝta adreso: info@literaturavivo.com

Erika Godo: goderika@gmail.com

John Huang: 4882588@outlook.com

Gratulvorto de Duncan Charters



UEA prezidanto Duncan Charters kaj John Huang en Toronto, Kanado, julio 2025

Mi deziras gratuli la iniciaton de nova literatura revuo, *Literatura Vivo*. Por la Esperanto-movado, unu el la plej konvinkaj argumentoj por montri la evoluon de Esperanto estas la ekzisto de vasta literaturo originala kaj traduka. Hodiaŭ multaj legantoj preferas tujan senpagan aliron al materialoj, do estas bonega ideo decidi pri tiu formo por la nova revuo, kiu espereble prenos sian lokon apud aliaj kiel *Literatura Foiro* kaj *Beletra Almanako*. La granda avantaĝo de Esperanto estas, ke lernintoj povas relative rapide verki en la lingvo, tute unika fenomeno. Mi esperas pri brila estonteco por tiu bela nova revuo.

Duncan Charters

La Unua Libro


Erika Godó



En malgranda ĉambro sidis feliĉe junulo kun brilaj okuloj. Lia nomo estis Ludoviko Zamenhof, kaj antaŭ li kuŝis revo en formo de maldika manuskripto. La jaro estis la 26-a de julio 1887, kaj lia koro batis kun ekscito kaj timo. Diversaj pensoj traflugis lian menson: Ĉu la lingvo, kiun mi kreis kun tiom da amo kaj espero, fariĝus ponto inter homoj? Ĉu la mondo akceptus mian vizion?

Lia mano paŝtis super la paĝoj, sur kiuj estis skribitaj simplaj vortoj kaj klaraj frazoj. Ĉiu vorto estis kiel semo, plantita en la teron de internacia kompreno. Li rememoris la multajn noktojn, kiam li laboris ĝis lumo de la mateno, polurante gramatikon kaj vortaron, esperante, ke la lingvo faciligos komunikadon inter diversaj nacioj. Kaj tiel, la juna Zamenhof paŝis en la historion, ne nur kiel kreinto de lingvo, sed ankaŭ kiel portanto de espero, kredo, kaj la ideo, ke kompreno povas esti atingita, se nur ni havos komunan lingvon.

Feliĉan Tagon de Esperanto!



Sep poemoj de

Benoît Philippe



Benoît Philippe

Li

Hipnote li rigardas kortofunden.
Kiel viola vinko surfosile,
li volviĝas ĉirkaŭmortotenajle.
Dum ekstere krispiĝas suplabrize
peonioj milbele silkofajne,
la mondo, el kiu li liberiĝas,
kuŝas jam nuda, triste kortofunde.

.....

Ĉio preterpasas

Ĉio kompate preterpasas
ankaŭ la nuboj kaj la pluvo
ankaŭ la nizo kaj la vivo.

Neniam plu mi leki devas
de fremdaj piedoj la polvon
aŭ inside fabriki pulvon.

Mia pio turbule pulsas
petolgaje kaj senrelikve.
Miaj vojoj iras oblikve.

Tamen kiom da homoj
nun je tiu ĉi horo
desperas kun angoro?

.....

Demando al ĵus mortinta Louis

Ludon de mevleĝera vel'

sur ĉiela blu'

vi ne plu vidas.

Vi ne plu spiras.

Sed kiu el ni du pli blindas nun ?

Ĉio aperas al mi plu

kiel mirinda kairno

kies vojmonro ne ĉesas konfuzi.

.....

La malsanulo

Preskaŭĝibe trajtotorde li sidiĝis.

Liaj okuloj flagris enkavaj.

Nepo flustre petis lin kunludi.

Li fiksrigardis vake altable.

Tranigris muŝo sur ruĝo tablotuka.

Nepo mute hipnotis ekrane.

Por sufoki sian depresion

li serĉis plej freŝan novaĵstrion:

“furoras distriloj dum falas fortreso”

.....

Ruslando dum la jaro 2024

Ŝtala kakia kobrego
lante antaŭenrampadas
ukrainicide
sur la ebenaĵo.

Ĝia veneno korodas
jarmilan karan fratecon.
Jam punendas amo
post la kobrovosto.

Neniu ŝtono nek gruzo,
neniu glebo nek greso
ne ŝvitas per sango,
ne ploras pri l' Homo.

.....

Esperantiĝo aŭ heroigiĝo?

La vivon Aleksandr Salmin tia komence ne imagis.

Bubaĝe li rigardis siajn gepatrojn absolute superaj aŭtoritatoj.

Inter respekto kaj timo li kreskis en etoso ŝajne normala.

Nek dorlotita, nek malzorgita li sentis sin.

Bona infanaĝo tiutempe ĝuste tiel aspektis.

Poste la efebo lasis sin tenti de kuriozaj hazardoj...

tenti al tio, kion li prenis por aventuro ekscita.
Li eĉ ŝovis la nazon en rondojn de batalantoj por Esperanto.
Sed en nia mondo hazardo kaj idealo regas ja malmulton.
Diskrete kompanoj kaj instruktoroj influis lian spiritan evoluon.
Pro surprizoj kun gravaj sekvoj lia vivo iom post iom iĝis malstabila.
Finfine al neniu plu li povis fidi.
Li tial kutimiĝis forpeli el sia mondo fidon kaj esperon.
Jen ankaŭ li fariĝis mensogulo, tamen deca mensogulo
en kies mirinde brunokula rigardo
gravuriĝis enigme demanda esprimo.
Froste kaj indiferece li nun salutis la najbarojn,
cetere ankaŭ ili mensoguloj.
Ĉiuj ja friponis laŭ sia kapablo kaj kuraĝo.
La gazetoj gurdus nenion edifan, multon egoisman.
Li ilin ensorbis. Ne tedis al li ensorbi ĉiam pli kaj pli.
Liaj kompanoj unu post alia ilin eĥis, iris al batalkampo kaj heroe falis.
Laŭdire ni neniam scias kiam nia horo ekbatos.
Sed por homoj, kiuj fajfas pri danĝero, ĉio havas specifan perspektivon.
Li ne plu timis, eĉ ne pro taŭgaj armiloj de sindefendantoj.
Li do fine faris klaran decidon:
frontsoldate riĉiĝi kaj eventuale eĉ heroigi.
La 4-an de novembro 2024
li sukcesis perdi sian vivon
agresante najbaran landon,
sed postlasante al edzino kaj infanoj eternan heroon
sub mirinde bruna tero.
La vivon Aleksandr Salmin tia komence ne imagis.

La ukraina dizertemulo

Batali kontraŭ timospasmo
pro rabistoj en embusko
pro paforoj kaj sadistoj
el Moskvo aŭ Grozno?

Batali kontraŭ maleliksiro
kiu nin inundas inside
erozias la eroton
broge ronĝas la koron?

Batali kontraŭ defetismo
en epoko skisma
kiam uraganas malamo
kaj am-elano ŝajnas lama?

Batali? Ne! Mi preferas
dizerti, forfuĝi
min savi se la patruj' inferas
kaj lasi sadistojn tie loĝi.

Mia hejmo estu mia vojo
ajne enurba, ajne kampolaŭa!
Lasu min iĝi milpatruja
kaj resti senkrima homo!

Julia penseto

Moissey Bronsteyn



En la infero de tagoj juliaj,
kiam surstrate degelas asfalto,
flagras belaĵoj de la junulinoj,
kaj mi stumbladas gapante ĝis fal', do

ĉu mian kapon mi klinu al tero
por ne rimarki pugetan eksvingon,
mambalanciĝon en arda infero –
tiun eterne allogan in-lingvon?

Aŭ, forgesante pri grizo de l'barbo,
lerte aliru mi la lindulinon:
- Hej, fraŭlineto, jen estas la bardo,
kiu konservas al amo inklinon.

Ve, ŝi respondos plej filozofie,
kun certa dozo de pura indigno:
- Kara avet', iru for de ĉi tie,
ĉar mi ne trovas vin en paradigmo.

Mi flankeniros de ŝi senobstine,
ne atendente de ŝi vangofrapon.
Paca paŝad' mia daŭros, sed mi ne
klinos,
ne klinos,
ne klinos
la kapon!



Sonetoj al mia Muzo

I

Ellernis mi metion de poeto,
komencis versi. Tamen – jen problem’:
ideon trovi freŝan, sen ripeto.
Do nur tradukis mi, ne verkis mem.
Nun ĝojas mi: finiĝis ĉi vegeto,
mi dankas mian Muzon pro helpem’.
Laŭ ŝiaj sentesprimoj kaj suĝeto
jam kun facil’ naskiĝas la poem’.
Mi volas, ke ŝi estu plej proksime,
ja vivas ambaŭ ni, kaj en sekret’
mi revas eĉ pri nia infanet’.
Jes, dume kunas ni nur enanime,
kaj nur poemoj estas la idar’,
sed – ne prognozu eĉ por sekva jar’!

II

Tutcerte jam ne novas ĉi konfes’:
Ho Muzo! Vi agordas mian liron.
Inspiron, alivorte – inan spiron
bezonas la poeto por sukces’!
Eĉ plie – mi parolas sen permes’,
kaj vi pardonu min, normalan viron,
ke mi tre ofte sentas la deziron
pri via varma tuŝo kaj kares’.
Do penu min kompreni, mia kara:
ne indas timi vokon de l’ natur’,
se ĝin kondamnas opini’ najbara,
ĉar vin apudas homoj sen kultur’.
Ne gravas! Vi ne estas deksesjara,
kaj rajtas mem decidi pri futur’.



Valentin Melnikov




III

Se mia verso estas tro aŭdaca,
vi timas – kion diros la popol’?
Ja skribis foje la poet’ sagaca:
malica lang’ similas al pistol’.
Pretekste de la onidir’ minaca
vi min rifuzas, malgraŭ propra vol’.
Nu kion fari? Mi jam estas laca
ripeti plu: ne kaŝu vin en sol’,
forgesu de timema prudo vanton –
klaĉuloj ne komprenas Esperanton,
do ne aperos kaŭzo por akuz’.
Sed por la komprenema rond’ alia,
Esperantista «rondo familia»
malaprobindas ĝuste la rifuz’.

IV

Ho Mia Muzo! Vane vi protestas,
ke tro maldecas mia versrakont’.
Kompare kun Peneter mi modestas,
eĉ se mi volus ion en estont’.
Ja mi ne skribas, ke mi vin malvestas,
kaj tiel plue – do pro kio hont’?
Samtiaj sentoj dum jarmiloj estas
por poezi’ neelĉerpebla font’.
Vi, mia Muzo, saĝas kaj prudentas,
kaj miajn vortojn kontraŭargumentas.
Mi petas, kara, restu en kviet’!
La sentomanko kaŭzas apation.
Se mi de vi dezirus sole «tion»,
do ne aperus, certe, la sonet’.



V

Ho Muzo! Mi serĉadas plej persiste,
per kiu vorto mi titolu vin.
Sed vi rebatas ĉiujn kun obstin',
severe min admonas kritikiste.
Ne indas, vere, – mi konsentas triste –
banalajn vortojn uzi laŭ rutin'.
Ne plene taŭgas «samideanin'»,
kaj la ceteraj sencas tute diste.
Ne helpas la perfekta lingvosci'
difinon trovi – tasko tre komplikas,
ja nekutimas la situaci':
ĉu ni dum jaroj simple geamikas,
ĉu io kromas? Mankas la noci',
ĉar nia kazo en la mond' unikas.

VI

Por fuĝi el la marĉo de banal',
singarde iru ni laŭ pado streta.
Se malkonvene sonas vort' konkreta,
fabelon krude rompas la real'.
Subtila sento, kvazaŭ florpetal',
tuj velkas pro ektuŝo maldiskreta...
Do vera majstro en poemo preta
ne krios vane: «Jen la ideal'!»
Je l' vortoj nia lingvo estas riĉa,
sed, elektante ion por deklam',
patoson ŝparu, por ne esti kiĉa.
Pro misa blovo estingiĝas flam'...
Verkante, mi fariĝas superstiĉa:
neniam uzas mi la vorton «am'».



VII

De homamaso fore, en izol',
obsedas min serena hela tristo:
La sorto de «poeto sen popol'»
neeviteblas por esperantisto.
Jen – iu parkerigis kun bonvol'
dek ses regulojn laŭ konata listo
por elementa skribo kaj parol'.
Sed estas maniero de l' ekzisto
por mi la lingvo. Do ĉagrenas min,
ke mia kara samideanin'
en ĝia rego laŭnivele mezas.
Kaj eble superfluas mia pen'
la versojn zorge ĉizi por kompren',
ĉar... tutegale ilin ŝi aprezas.

VIII

Kviete staris neĝkovrita mont'...
Jen sonas pafo, kiu tuj ekmovas
lavangon, kaj potenca ĝia front'
eĉ firman baron kun facil' forblovas.
Ho kara Muzo! Post nia renkont'
en poezio mi jam ne senpovas –
apude kaj malantaŭ horizont'
facile temojn kaj komparojn trovas.
Kaj jam sen via helpo povas mi
poemon verki. Foje eĉ premi'
kaj publikigo kronas la laboron.
Abunde fluas versoj en liber'...
Ho Muzo! Mi vin dankas kun sincer'
pro tiu paŝ', trafinta mian koron.



La larmoj de mia patrin'




Belulino

La larmoj fluas sur ŝia vizaĝ',
doloro vekigante en mesaĝ'.
Sekretoj venas el la pasint',
kaj en ŝia koro restas la tint'.

Ŝi kaŝas perlojn, ĝoj' kaj plor',
brulanta sento restas en kor'.
Sed lumo brilas, vokas esper',
kaj larmoj spegulas vivon sincer'.

Kiam la larmoj falas sen bru',
revoj ekfloras en dolĉa lum'.
Kvankam malgajo restante anim',
kaj amo resendadas pacon sen lim'.



La kiso de somero



Erika Godó

Kiso varma, luma, hela,
kiel revo dolĉa, bela.
Suno brilas sur la vojo,
vento kantas per ĝojo.

Floroj donas bonan senton,
herboj dancas en la venton.
Lago spegulas ĉielon,
kampoj odorigas mielon.

Kiso de somero brilas,
magia tago trankvilas.
Oraj nuboj vizaĝon kaŝas,
gutoj dolĉajn revojn lasas.

Nokto venas, luno ludiĝas,
brilaj ŝanĝoj en ĉielo raviĝas.
Griloj kantas dolĉe, klare,
vento flustras surmare.

Riveretoj fluas rapide,
fiŝoj naĝas malrapide.
Papilioj dancas lerte,
somero kisas nin certe.



La sekretoj de la rozoj


Gutoj da rozoj brilas sur rozpetaloj,
en tagiĝo-kiso de pluvo kiel kristaloj.
La magio de la petaloj en iliaj koloroj,
sonĝo de la mondo, ĉiuj iliaj ombroj.

Inter la petaloj sekretoj estas kaŝitaj
Ili flustras rakontojn pri koroj forlasitaj.
Memoroj de amaj rompitaĵoj nuntempe,
signoj de malĝojo kaj eterneco samtempe.

La dornoj estas danĝeraj, viglaj gardistoj,
ili subtenas la rozojn per akraj persistoj.
Malantaŭ beleco estas ofte doloro,
en la ombroj de l'vivo, sub la luma oro.

La lumo de l'suno tra roso milde rompas,
ĉirkaŭita de rozoj, la mondo silentas.
Ĉiu guto portas memorojn, neforgesitaj,
kiel larmoj de l' tero, en ilia koro gravuritaj.

Flustroj de vento tra folioj misteras,
sekretoj, kiujn nur ili komprenas.
Sub la ĉielo ĉiuj tiel vasta kaj senfina,
ni ĉiuj estas partoj de sia rakonto fina.



Verkisto: *Belulino*



Voĉlegi La Libron de Poezio

Antaŭ mil jaroj, la Libro de Poezio
kantis pri reĝoj, popolo, harmonio.
Poetoj verkis en kampo kaj placo,
sen ombro de enuo, kun versa graco.

Majstre ĝin tradukis la saĝa Vejdo,
kun pasia teamo en brila procedo.
Videoj naskiĝis, tra mondo flugis,
antikva trezoro en lumo disiĝis.

Mi kunportis ĝin kun ĝoja vizaĝo,
tri jarojn oferis kun sindona kuraĝo.
El ĉiuj mondpartoj famuloj legadis,
kun espero kaj amo la versojn laŭtadis.

En Torino, sub suno kaj ĉiela velo,
kolektiĝis voĉoj kun spirita celo.
De Azio ĝis Afriko fluis lirikoj,
en Ameriko kaj Eŭropo — muzikaj spiroj.

Unuafoje, cent voĉoj en rondo
deklamis Poezion — donaco por la mondo.



John Huang



Lotusoj...

Lilaketo



Dum miaj frumatenaj promenoj
mi kontemplas ĉi tiun lageton,
havanta milojn da lotusoj florantaj...

Rigardas ĝin per larmaj okuloj
la delikatan korpon la uloj,
kiel ĝi radias el la malpureco.

Simple milde leviĝante supren...
el la ŝlima lageto, nur pure
al la viviganta sunlumo eterne.

Multaj homoj povas ĉerpi forton
el ĉi tiu purmajesta planto
por sia vivo, pluvivi la malbonon.

Mi certe...



Virino en somera robo...


Lilaketo



Mi, kiel infaneto, eble dekjara,
en kort' de bazlernejo estis sidanta.
Somera sun' brilis, ekhaltis momento
ekvidante ŝin, mian instruistinon.

Kiel fein' en bela kolora robo,
Ŝi marŝis facile tra la griza korto.
Mi tute ne konis la novan virinon,
sed esperis, ke ŝi iĝos mia instruistino.

...kaj jes, dank' al Dio, post nur kelkaj horoj
surhavante sian simplan floran robon
ŝi enpaŝis en nian grizan klasĉambron,
brila fein' en polvkovrita lernejo...



NI IRU

Ĉi tiu ŝipo ruliĝas,
estas objekto disverŝita,
sed la pasaĝeroj estas fortaj
kaj tenas unu decidon:
alveni al la insulo de espero.

La ondojn, vi ne povas riproĉi.
Lasu ilin daŭre ludi.
La ondaron, kiu povas reteni?
Lasu ĝin daŭre ruliĝi.
Lasu la vivon esti bunta.
Ni tenu la okulojn malfermitaj.

Estas malnova turo trans la maro.
Tie, ekzistas hela lumo.
De malproksime, oni flaras santal-odoron
el granda brulanta radiko.
Estas la sono de ludanta sasando;¹
infanoj kantas la kanton Bolelebo;²
estas festo kun fumigita viando;
estas homoj, kiuj trinkas laruon.³
Katemakmaizo estas la ĉefplado.⁴
Ĉiuj ofertas rideton.


Esperantigis la aŭtoro (Ungaran, 11 jan. 2023)

Notoj: La originala poemo ("Mari Katóng Pi") estis verkita en la kupang-malaja (indonezie: *bahasa Melayu Kupang* aŭ *bahasa Kupang*), malaj-bazita kreola lingvo uzata kiel gepatra lingvo kaj interlingvo en Kupang (la ĉefurbo de la indonezia provinco Orienta Nusa Tenggara, situanta en Okcidenta Timoro) kaj ĝia ĉirkaŭa regiono.

1. *Sasando* estas harp-simila korda muzikilo. Ĝi estas tradicia muzikilo indiĝena al insulo Rote, Orienta Nusa Tenggara, Indonezio.
2. *Bolelebo* estas populara kanto laŭdanta Timor-landon.
3. *Laruo* (kupang-malaje: *laru*) estas konata tradicia trinkaĵo farita el fermentita dolĉa suko de la floraj tigoj de palmarbo (lontararbo), kun trempado en certaj radikoj.
4. *Katemakmaizo* (kupang-malaje: *jagong katemak*; davane: *penpasû*) estas tradicia timora manĝaĵo. Kutime, ĝi estas farita el seka maizo bone boligita kune kun faboj, papaj folioj kaj fruktoj, aŭ kukurbaj folioj kaj fruktoj kaj aliaj verdaj legomoj el la familia ĝardeno. Foje, ĉi tiu tipa manĝaĵo, facile trovebla tra la insulo, estas servata kun viando (eble porkaĵo) aŭ fiŝo.



Yohanes Manhitu



HAJKOJ

Elena Popova

Iaŭ bildoj de Helga Plötner



Blanka ponto kaj
blanka cigno en akvo.
Printempa magi`.

Bela filino -
bild` de feliĉa patrin`.
Odoras floroj.




Nepo kun kato -
eterna viv` en bildo.
Am` kaj ĉiamo.

Viro kun barbo
kaj bonkora rideto.
Beno de Dio.

Sep pionioj -
beleco kaj fajneco.
Dia talento!

Maja beleco -
odor` de violoj kaj
freŝec` de fontan`.



Ruĝa rozo

La carin`de l` floroj
en la kort` odoras,
sed pikas per dornoj.


La roz` ruĝkolora
allogas mian koron.

Manon mi etendis:
- Ne pluku, mi petas,
mi kaŝas sekreton!

Restis nur memoro
pri belec`,odoro...



Elena Popova



Junia suno

Jardanka Miric



Plaças al mi freŝa aer'.

Malrapide sed certe varme

venas suna veter'.

Ĝi venas senhalte kare.

Varma venteto.

Sunumas mian vizaĝon.

Tenera kiso por mi

plaças al mia aĝo.

Klaras ĉielo blue.

Eĉ ne unu nubet'

videblas.

Nur aviadila spuret'

Vetero sunas plue.

Kakto

Lenke Szász



Dum tago la suno ardas,
kaj la nokto malvarmas,
La pluvo estas rara gasto,
sed eltenas la brava kakto.


Neniu ĝin ame flegas,
prizorgon ĝi ne bezonas,
sole vivas ekde semo,
tiel kreskis por elteno.

Malfavoraj vivkondiĉoj,
estas por ĝi tuta vivo.
Ĝi defendas sin per dornoj,
kaj eĉ havas ankaŭ floron.

Homo, ĉesu la plendadon,
ne forgesu la benadon,
benu vian krudan sorton,
ja ĝi donis al vi forton.



Kanto pri feliĉo



Valentin Melnikov

Kiam la koron forlasis esper'
kaj atendeblis soleca vegeto,
venis subite al ni primaver',
benis nin sorto per sia rideto.

Kredis mi, ke pro anima malplen'
ami denove ne havos mi forton,
sed venis vi kaj degelis la splen',
nun ni feliĉas – kaj dankas la sorton.

Ni eĉ rezistis, sed malgraŭ la vol'
cedis, glitante laŭ sorta fadeno.
Portis nin vento leĝera – Eol' –
al la feliĉ', al mirakla haveno.

Verda stelet' iĝis nia lumtur'
spite al nuboj sur la firmamento.
Se en nebulo kaŝitas futur' –
ĝoju pri ĉiu aparta momento!

Oni ne plendu pri misa fatal'.
Viv' donas ŝancon – kaj tio sufiĉos,
ke la deziroj estiĝu real'.
Se vi persistos – do nepre feliĉos!



Piednoto: "Kanto pri feliĉo": la menciita tie vento Eol' estas aludo al la renkontiĝo EoLA (Esperanto - Lingvo Arta) en Ĉeboksary, 1993, kie mi konatiĝis kun la virino, al kiu estis dediĉita la poemo/kanto.

Poezimistero

Paŭlo Nascentes



Poezia mistero.

Komponi poemojn

similas al ĉiela nubo-arigo:

arigo de spiro, blov'vortigo.

Nubo montriĝas, ostro-iĝas,

aliiĝas – subita apero.

Poemo sin rivelas: malpli diraĵo,

plie kaŝitaĵo.

Poezion poemo vualigas.

Poezio malvualiĝas,

praa Suno sentempa.

Poezio Verbostaras

aŭ silentas

nubopalpebrume!



NENIES PROPAĴO ESTAS LA VERO



Malekera Bonne Idee

Amara pilol'
Nun, kiel infanludil'
Razkling'
Kion uzas por allogi ĉiu
Perfidi, friponi kaj trompi, per ĉi tiu
Nia falsita tero ne plu konas la veron tenas kiu
Ĉiu diras la veron, la malveron,uuu !!!

Karaj,

Ni estas en iu mondo kie ĝi malregnas
Kie trompi estas pli forta ol ĉio
Kie mensogemulojn oni multe kredas
Kie kion vi pensas kaj diras ne estas tio
Kio estas ĉio
Kie la monavideco estas pli kara ol la amo

La vero,
Ekzistas
Helpas.

Malantaŭ ĝi, sed staras forta fenomeno
Kredinda, ankaŭ prefererita de ĉiu kaj ĉio
Malvero.

Kiu estas fidinda ?
Adam kaj Eva trompis
Dio estas vidinda, ĉu ?
Mi, vi kaj ili fidus je vero, ĉu ni jam trompis ?



MI ESTAS VERD'NACI'EC'UL' (sennaci'ec'ul')

Malekera Bonne Idee

Mi naskiĝis kun iu naci'ec'
Gepatroj miaj estis de iu naci'ec'
Ĉiu havas sian propran naci'ec'n
Eĉ bestoj havas sian naci'ec'n


Antaŭ ĝia alven'
L'universo ne konis liberecon
La planedo malplenis je koheremo
Likis, malŝveliĝis l'amo de ĉiu al ali'naci'ec'ul'
La planedo, landoj estis nur malhelaj

Esperanto,

Vi, kiu malstrabigas niajn okulojn
Lutas, estigas, plibonigas,
plifortigas kaj reunuigas
Disfenditajn unu'naci'ec'n kaj amon
Por paradizita ,
plenpaca kaj libera mondo
Kiun ni konas.

Mi estas verd'naci'ec'ul'
Iu, kiu komprenas
Ligas per amo kaj paco
Vipas fraŭdon, teron milde plugas
El kiu krutas
Interkompreniĝo kaj altruism.

Verd'naci'ec'uloj sarkas herbaĉojn
ŝelas malamon
Kaj laboras por libera mondo
Ne kaduka planedo
Vivu Esperanto
Mi estas verd'naci'ec'ul'



AMIKECO (poemo fariĝinta kanto)


Malekera Bonne Idee

Amo gravas ol malamo
Amo estas malsekura
Sed amikeco sekura
Efemera estas ami
Trolonga estas amikiĝi.

Ami, estas,
Kaŭzi por lia koratako
Ĉantaĝi lian proprajon
Akuzi senkulpe
Mortigi senindulge

Amikiĝi estas kun konsenti
Havante pacon
Preta por alia batali
Kvankam elĉerpas la inko
Ni scipovu tion.

Sed daŭrigi
Bonan ĉirkaŭaĵon por alia plugi
Defendi
Kredi kaj helpi.
Ni amikiĝu.



NASKIĜO KAJ MORTO

Malekera Bonne Idee

Du malamikoj
Du diferencaj tagoj :
Pac-kaj-ĝojig-tago
Plorig-kaj-bedaŭrig-tago,
Naskiĝo kaj morto.

Galanto estas la naskiĝo
Tago, kiu lumigas la mondon
Kiu preparas la futuron.
Sankta benita tagiĝo
Sed,

Sufer-fonto
Mizerigulo
Timinda tago
Nekredinda.

Teroro estas la morto,
Malĝojiga ulo
ĵaluza pri nia vivo
kaj instrua momento

Mi kredas je la morto
sed timas la naskiĝon.
Tago, dum kies
Ĉiuj diras
Bonvenon en ĉies
Mizera, aflikta mondo
En via tero, en nia planedo.



LA FINO (poemo fariĝinta kanto)

Malekera Bonne Idee

Kiel la periodo pasis
De Adam kaj Eva
De la unua mondmilito forblovis
La mondo iĝis tia
De la dua mondmilito forkuris
La mondo fariĝis alia
De tiu jaro 1946 ĝi ekzistis
Ĝis nun oni ne scias kiel aspektos la mondo
baldaŭ
Sed ĉio iam finiĝos, ĉio malaperos.


Mi ne estas la sola
Min vi konis, sole restos statuoj miaj
Oni ne scias kiu estas la sekvonta
La mondo estas fatala.

Ni trairu nian vojon
Ni nian vivon heligu
Ni laku niaj piedojn
Ni niajn ventrojn je ĉio pakumu
Oni ne scias kio baldaŭ okazos
Ni estu ĉiam pretaj, ni sukcesos
Kion ni travivos ?

La fino,
Estas kaŝita, sed surpriza donaco
amuza kaj ĝojiga,
Flagra tago, sed pli akra kaj pinta,
Ĝin travivos pacientoj ĝisfinaj,
Ne avidemaj,
Sed kuraĝuloj okulmalfermaj.

La fino estas nediveninda
La mondo estis kreita

Sed kiam fina ?



Poetiko



Maria Nazaré Laroca

Ĉu poezio necesas?
Versoj al kio utilas?
Kiel la muzoj ekestas
en nia mondo delira?

Silente poetoj kaptas
la melodion de l' vortoj
per surpriza luma sparko,
kiu okulojn ektuŝas.

Tiam feliĉo intensa
vizitas poetanimon,
kiu reĝisoras sentojn,
kaj jen poemo naskita!



Teksado

Vorto estas steloj,
kiujn ni eklumigas
aŭ estingas ĉiam.

Ĉu ekzemplo? Ŝpinisto,
teksisto de sonĝoj,
vivo kaj morto.

Antikvaj popoloj al diinoj
atribuis tian oficon:
al Nornoj, Moĵroj, Parcoj.

Sed la destinon ĉiutage
ni teksas en l' infanaĝo
de l' animo ankoraŭ.

La Leĝo de Amo
kuŝas en la konscienco:
donaco de Dio al ni.

Necesas nur kuraĝo
por ke ni lumigu
la stelon definitivan.



Maria Nazaré Laroca




VENTO DE L'AMO

Kelly Muteke



Ŝanĝiĝas la aer',
Foriras la mizer',
Ne plu ondoj sur la mar'
Trankviliĝas la arbar'.
Bela vento, en la kor',
Ŝanĝas sangkoloron.

Kvietiĝu la anim',
Vento de l'amo sublim'.
Per aer', rapidec',sentim',
La vento de l'amo blovas.
Fore estas malprosper',
Admirinda, freŝa, estas la aer'
Per tiu vento, ne plu mizero'.
Forportas malbonon el la ter'.
Ĉar ĝi estas vento de l'amo.




Senespera vivo

Vetero nuligas etoson.
Malbono realigas la promeson.
Kiel akcidento sur vojo.
Milito malaperigas ĝojon.
Mallumo proksimiĝas.
Senespera, vivo iĝas.
Do kiel konkludi?
Decidoj sen pensadi.
Senespera vivo en la estonteco.
Malaperas inter ni la potenco.
Sensenca mi vidas la estonton.
Ĉirkaŭ mi estas senprospera monto.
Gejunuloj estas forlasitoj.
Mankas laboro, venas milito.
Homoj uzas perforton.
Ne plu estas vortoj.
Ĉu la estonto estos tragedia dramo?
Ĉu fartos bone, la homaro?
Ĉu junuloj estos laboristoj?
Ĉu paco ankoraŭ regos?
Senespera estas la vivo .
La futuro estas malcerta.
Esti homo iĝas malkomforta.
Mi esperas iam, la ŝanĝon.



Kelly Muteke



KIAM PLORAS LA STELOJ



Verkis:
Rudina Muharremi Beja



Tradukis:
Bardhyl Adem Selimi

La koro min brulas sub la cindro de silento,
kiel estingita lampo en la mezo de ŝtormo.
Infano falas, sen voĉo, sen kulpo,
kaj la tero ektramas
pro la pezo de vivo neniam vivita.

La potenculoj,
kun manoj el fero kaj animoj el glacio,
movas limojn per sangokovritaj fingroj,
vendante iluzion de venko
super la tomboj de senkulpeco.

Ego estas soifo ne estingebla,
malsato kiu eĉ la lumon formanĝas,
dum popoloj, kiel rompitaĵoj en vento,
rigardas al ĉielo kiu silentas.



Patrinoj kudras doloron per fadenoj de preĝo,
patroj – vivantaj ŝtonoj kiuj ne povas krii,
infanoj dormas en litoj el timo,
kun songoj kiuj brulas kiel folioj en fajro.

Ĉiu raketo estas ŝirita verso,
ĉiu sireno, krio kiu ŝiras animon,
kaj ĉiu malgranda korpo etendita en koto
estas universo kiu neniam plu vekigĝos.

Mi ne silentas.
Mi krias por tiuj fariĝintaj polvo
sen diri “bonan nokton” al la patrino.
Por tiuj, kiuj malaperis kiel estingitaj steloj
el la ĉielo de blindula mondo.

Neniu flago pezas pli
ol la lasta spiro de infano.
Neniu kialo pravigas la morton de songoj.
Milito ne estas honoro,
ĝi estas la honto kiun ni kovras per silento.

Forgesitaj • Kvar Sezonoj



de *Shi Yu*




tradukis *Ardo*


tiuj memoroj,
kiujn mi fingre nombris
estis ĵetitaj en la rubujon kaj forigitaj
kiuj ne troveblas, do
rezignu ilin

ripetaj scenoj de maniulo
disrompiĝis, do kunigoj
estas superflujaj

ne gravas ke la akvo fluus
en la koton aŭ en la riverojn
nature aŭ
destinite

oreloj pendas sur la muro
tamen oni ne povas aŭdi klare
kion la vento diris





Verkis: *Anna Turek*

Infaneca Ĝojo



Tradukis: *Ryszarda Kwiatkowska*

En la herbejo, kie la suno ridetas al la floroj,
Knabino en robo kuras feliĉe,
Apud ŝi estas vila hundo, katido dormetas en la herbo,
Heliko konfuziĝas en la tumulto.

Kekseto en ŝia poŝo, folio de arbo en ŝia mano,
Ŝi ĉasas papilion, provante kapti ĝin dumfluge,
Super ŝia kapo, birdo kviete kantas al ŝi,
Dum ŝi krias al la ĉielo, "Truo en la aviadilo!"

Ŝi parolas al kuniklo kiel al frato,
Bestoj fidas ŝin, konante ŝian koron,
Por ili, ŝi estas la plej bela floro,
Kiam ŝi tenas bukedon da sovaĝaj floroj en sia mano.

Neniu ĝojas pri la mondo kiel infano,
Ĝi ridas pri ĉiu neatendita,
Ĝi povas ĝoji pri malgranda vermo,
La plej bela donaco estas la ĝojo de infano.



Somero

----laŭ ĉinesko Bon-sudo

Zhuang Qixiong



Somero

fridas en silent'.

Ne dormi pro nokta pluv',

nur bonodori en vent'.

Sola por vin-sent'.



Bon-sudo: ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Pasioplena rozo



elĉinigis *Yi Qiao*



Verkis *Zhuang Nu*

Al vi mi tiun ĉi rozon donas,
Kiu mian afablecon proponas.
La rozo estas pasioplena,
Nia amo estas ĉiam bontena.

La rozo nenion parolas,
Sed tamen vin ĉarmi volas.
Mi estas eĉ pli silenta,
Kaŝiĝas kore sopiro senta.

Espereble vi komprenas mian koron,
Kaj akceptos mian fervoron.
Ni estu ĉiam kunaj,
Eterne kunaj!



多情的玫瑰（莊奴）

這一朵玫瑰送給你，
表示我對你的心意。
你知道玫瑰實多情，
此情永不渝。

玫瑰雖然無言，
卻能讓你著迷。
我更沈默無語，
深情藏心底。

但願你知我的心，
接受我的情意。
我倆永遠地在一起，
永在一起。

Rigardante sor la stelplen-ĉielon



— de *Wen Jiabao* (ĉina eksĉefministro)



— Esperantigis *Yi Qiao*

《仰望星空》

——温家宝

我仰望星空，
它是那样寥廓而深邃；
那无穷的真理，
让我苦苦地求索追随。
我仰望星空，
它是那样庄严而圣洁；
那凛然的正义，
让我充满热爱、感到敬畏。
我仰望星空，
它是那样自由而宁静；
那博大的胸怀，
让我的心灵栖息依偎。
我仰望星空，
它是那样壮丽而光辉；
那永恒的炽热，
让我心中燃起希望的烈焰、响起春雷。

Sor rigardas la stelplen-ĉielon mi,
tiel vasta kaj profunda estas ĝi.
Mi l' senfinan veron serĉas
kaj sekvas ĝin kun pena energi'.

Sor rigardas la stelplen-ĉielon mi,
tiel sankta kaj solena estas ĝi.
La sever-justeco min plenigas
per tim-respekto kaj am-emoci'.

Sor rigardas la stelplen-ĉielon mi,
ja libera kaj trankvila estas ĝi.
Ties vasta brusto al mi dotas
la rifuĝon por anim' kun fid-raci'.

Sor rigardas la stelplen-ĉielon mi,
ja impona kaj helbrila estas ĝi.
L' eterna ard' flamigas kor-esperon,
kaj printempa tondro eĥas kun pasi'.

Luno, Ho! Mia Lun'

Dum infana temp' en patrina brak',
Al la lun' mi dolĉe ridetis;
Ŝi estis amik' fidela, sen krak',
Kvankam kor' turmentiĝis.
Lunradioj karesas min,
Kiel nubet' blanka glitas sen fin'
Lunradioj karesas min,
Kiel nubet' blanka jen supren jen suben...

Dum gardante landliman posten',
Al la lun' mi longe rigardis;
Patrinan rideton ŝi portas al mi,
Kvankam kor' turmentiĝis.
Lunradioj karesas min,
Kiel nubet' blanka glitas sen fin'
Lunradioj karesas min,
Kiel nubet' blanka jen supren jen suben...

Ho Lun', mia kara Lun',
Vin petas mi: nokt' post nokto
Restu ĉe mi ,
Ĉis la tagiĝ'!



Trad. *Batalanto*



Verkis: *You Xiaogang*



Kun-verkis: *Han Jingting*



月亮之歌

当我躺在妈妈怀里的时候，
常对着月亮甜甜地笑，
她是我的好朋友，
不管心里有多烦恼，
只要月光照在我身上，
心儿像白云飘飘，
只要月光照在我身上，
心儿像白云静静地飘啊飘。

当我守在祖国边防的时候，
常对着月亮静静地瞧，
她像妈妈的笑脸，
不管心里有多烦恼，
只要月光照在我身上，
心儿像白云飘飘，
只要月光照在我身上，
心儿像白云静静地飘啊飘。

月亮，我的月亮，
请你夜夜陪伴我，
一直到明朝。

La malĝoja sekreto de la roko



Erika Godó

Mia rakonto temas pri roko kun malgaja sekreto, pri du geamantoj, kiuj ne povus esti edziĝintaj, tial ili grimpis al la terura supro de la roko kaj ĵetis sin en la vertiĝan abismon tenante sin reciproke je la manoj. Ilia rakonto restas legendo, kaj la rakonto de amo vivas tiel longe kiel ekzistas homoj sur la tero, kiu fidas je la vera amo.

Estas roko, kiu ofertas belan vidon sed ankaŭ havas malĝojan legendon alkroĉitan al ĝi. Supre de la roko staras ligna kruco, kiu estas tre malnova, nur la plej maljunaj homoj en la vilago memoras ĝian malĝojan historion.

Akva muelejo staris kontraŭ la roko, kaj tie loĝis la vidvino kun sia mirinde bela filino, la knabino estis fama pro sia beleco en la lando, do ŝi havis multajn svatantojn. Sed iun tagon nova muelisto knabo alvenis kaj la knabino enamiĝis al la juna muelisto, kiun ŝia patro ne ŝatis. Ĉar ŝi volis edzinigi sian filinon al maljuna kaj riĉa grenokomercistoj, ŝi volis, ke ŝia filino havu riĉan edzon kaj bonan vivon. Sed la geamantoj jam planis sian vivon kune, kiam la muelisto diras, ke ŝia filino estu edzino de la riĉa svatanto anstataŭ la malriĉa muelisto. La knabino diris al sia patro, ke ŝi ne volu esti edzino de la riĉulo, ĉar ŝi amas la junan mueliston, sed ŝia patro estis avida kaj senkompata viro.

La knabino ne estis feliĉa, ke ŝia patro volas edzigi ŝin kun alia viro, do ŝi petis la knabon forkurigi la vilaĝon kune. Ili planis forkuri la venontan nokton, kiam la patro de la knabino estos endorme. Kiam ŝia patro vekigis, ili estos malproksime kaj neniu trovos ilin. Tiam venis la tago de ilia fuĝo, sed ilia plano misfunkciis, ĉar ili faris bruon kaj la patro de la knabino vekigis el sia profunda dormo. Li pensis, ke nerajtigataj homoj promenu en la muelejo kaj volas ŝteli lin, do li vestis sin kaj eliris en la korton. Sed li vidis nenion krom sia propra filino kaj la muelistknabo, kiuj forkuras ĝuste nun, kaj tio tre koleris. En kolero, li diris al sia filino elekti aŭ resti ĉi tie kun li aŭ foriri, sed se li elektas sian amon, tiam li ne volas revidi ŝin en la vivo. La knabino ne pensis eĉ unu minuton kaj foriris kun la knabo, sed la maljuna muelisto bedaŭris, kion li diris la sekvan tagon, li simple ne trankviliĝis. Do li organizis al grupo en la vilago, kiuj ekiris por trovi la forkurintajn geamantojn, kaj ili baldaŭ trovis ilin. Ili trovis la geamantojn ĉe la klifo, kiuj provis eskapi sed malsukcesis, pro tio ili ne havis alian elekton, do la geedzoj decidis kune saltos de la roko.



Knabino sciis, ke ŝia patro neniam lasos al ili pacon, sed ili ne povus esti unuj kun la alia tiel, do ili prefere elektus morton. Do ili grimpis sur la supron de la roko, kisis unu la alian la lastan fojon, poste prenis unu la alian la manojn kaj ili saltis en la profundon. La novaĵo de la terura tragedio rapide atingis la orelojn de la muelisto, kiu estis tute rompita aŭdinte la malĝojan novaĵon kaj mortis baldaŭ poste. La vilaĝanoj estis tiel kortuŝitaj de tiu tragika okazaĵo, ke ili decidis meti krucon sur la pinton de la roko memore al la mortintoj.

La kruco staras sur la pinto de la roko dum jarcentoj, plako estis lastatempe metita sur la flankon de la roko, sur kiu ĉi tiu mallonga poemo legeblas:

„Ligna kruco staras sur roko,
por neniam forgesi la veran amon.
Staru ĉi tie por posteularo kiel memoro,
ke du junuloj tre amis unu la alian.
Sed ili ne povis sigeli sian amon,
do ili kune forkuris al sia morto”

Ĉeriza vetero

Elena Popova



Kiam ili foriris de hejmo, la suno brilis kaj la ĉielo, sen unu nuboj, promesis belan printempan tagon. La ĉerizarbo en la vinberujo donis abundajn fruktojn, jam maturajn. Unu el la branĉoj estis fleksita al la tero sub sia pezo. Patro kaj filino iris por kolekti tiom, kiom ili povis porti. Ili hastis, plenigante du grandajn sakojn, kiam ili aŭdis malproksiman tondron. Ili apenaŭ povis eliri el la vinberejoj survoje al la urbo, kiam forte ekpluvis. Nenio estis videbla ĉirkaŭe pro la pluvmantelo.

Tute malsekaj, kun sakoj plenaj de akvo sur la ŝultroj, ili rapidis silente. Ili pasigis la unuhoran vojon en duono de la tempo sen halto. Ili ne sentis sin lacaj sub la minaco de pluvo kaj tondro de la kolera nuboj. Ili devis alporti la fruktojn hejmen...



Ili haltis ĉe la enirejo de la bloko por ellasi la akvon el la sakoj, jam ruĝa pro la ĉerizsuko.

Kiam ili revenis al la vinberejoj kelkajn tagojn poste, la ĉerizarbo aspektis malgaje forlasita, kun la putrantaj ĉerizoj lasitaj sur ĝi, kun la pendanta branĉo. Laodoro de putriĝanta frukto estis ĉie.

La grilo kaj la formiko

Lenke Szász



Post la rifuzo de la formiko, la grilo iris hejmen hontigita. Lia hejmo estis malvarma sen hejtado, kaj li rigidiĝis pro frostado sub la flava folio- kovrilo. “Sed mi vivas ankoraŭ”, konstatis li matene. Li ekstaris kaj eliris el sia dometo. Ekstere ĉio estis prujnokovrita, kaj kiam la suno ekaperis, la prujno arĝente brilis sur la herbaro. La grilo ekhaltis por momento, li sentis emon prikanti tiun belecon. Sed liaj fingroj frostis, kaj tio rememorigis al li la dumnoktajn pensojn: Li devas iri por kolekti ion, kion li trovos sur la kampo kaj en la arbaro: ion manĝeblan kaj hejtilon, antaŭ ol ĉio estos kovrita per neĝo. Eble tiel li ĝisvivos la vintron. Kaj eble la vintro ne estos tro malvarma.

Vigle li ekpaŝis por varmiĝi iomete. Li plukis berojn el arbustoj, sekajn vergetojn por hejtado, kaj ekiris al sia dometo. En lia koro eknestis espereto, kaj li zumkantadis dum paŝado.

Hejme li deponis la kolektitajn aĵojn, kaj ekiris denove, ja ĝis la vesperiĝo li povos ankoraŭ kolekti nutraĵojn. Ĉi-foje li iris pli malproksimen, kaj la sako sur lia dorso pleniĝis.

Subite la silento estis rompita de terura bruego. Ĝi estis bruo de maŝina segilo. Homoj laboris ie en la arbaro, faligis arbojn. La grilo klopodis eviti tiun lokon, sed la bruego ĉie aŭdeblis. Almenaŭ li evitos la homojn irante sur ĉirkaŭvojo. Ja la homoj kun botoj estas grandeguloj, ili povus surpaŝi lin, kaj eĉ ne rimarkus, ke la magra grilo mortis piedpremata sub la botoj.

Pene li portis la plenan sakon tra la arbaro. Subite li ekaŭdis korŝiran ploregon. Kiu ploras tiel senespere? Li ekvidis baldaŭ la formikon apud sia dometo. Kio okazis? La grilo proksimiĝis kun miro al ŝi.

Kial vi ploras, formiko? Kio okazis al vi? - li demandis.

Ho ve, mia domo estas ruinigita! Ho ve, miaj havaĵoj estas neniigitaj! Mi mortos pro malsato dum la vintro!

Sed kial? Kio okazis? - demandis kompateme la grilo.

Homoj, la malbenitaj arbohakistoj detruis mian domon. Ili trairis ĝin per ĉaro, ruinigis ĝin kun miaj riĉaj proviantoj. Mi mortos pro malsato kaj frostado, ho ve! Sed vi de kie venas? Kio estas en via sako?? - demandis la formiko scivoleme. Eĉ inter larmoj ŝi ekvidis, ke la grilo havas ion en la sako.

Mi kolektis iom da nutraĵoj por la vintro. Ĝi ne sufiĉos, sed mi kolektos ankoraŭ, antaŭ ol falos neĝo. Sed vi frostotremas. Venu, eniru en mian domon! Mi bruligos fajron en la forno, kaj faros por vi varman teon. - diris la grilo, kaj tiel li faris.

La formiko rigardis ĉirkaŭen en la dometo. "Vere li estas tre malriĉa. La grilo posedas nenion valoran krom violono. Sed ĉu ĝi valoras? Amuzilo por nenifarantoj ĝi estas, pensis la formiko.

Sed kial? Kio okazis? - demandis kompateme la grilo.

Homoj, la malbenitaj arbohakistoj detruis mian domon. Ili trairis ĝin per ĉaro, ruinigis ĝin kun miaj riĉaj proviantoj. Mi mortos pro malsato kaj frosto, ho ve! Sed vi de kie venas? Kio estas en via sako?? - demandis la formiko scivoleme. Eĉ inter larmoj ŝi ekvidis, ke la grilo havas ion en la sako.



Dume la grilo bruligis la verĝetojn, kaj metis teujon kun akvo sur la fornon. La ejo baldaŭ varmiĝis, kaj sentiĝis la bonodoro de la herba teo. La grilo verŝis teon en glanĉapetojn, ili servis kiel tasoj por li.

La varma teo estis tre bongusta en tiuj ĉarmaj ujetoj. La formiko akceptis ĝin iom honteme, sed ŝia humoro iom post iom pliboniĝis.

Mi dankas vin, grilo. Ĉiam mi pensis, ke vi estas facilanima, mallaborema, pro tio mi ne volis helpi vin. Sed nun mi vidas, ke vi estas bonkora, pli ol miaj parencoj. Ili ĝojis, ke iliaj domoj ne estis tuŝitaj, kaj rifuzis hepli min - ŝi diris.

La grilo ridetis kaj diris, ke verdire ŝi pravis, ja li devintus kolekti provizojn dum la somero. Sed nun li kolektos, kiom li povos por vivteni sin dum la vintro.

Ne malĝoju, formiko! Restu en mia domo, kaj mi dividos kun vi mian malmulton. La duan tagon ili kune iris al la kamparo por fari provizon por la vintro. Sur la kampo ili trovis falintajn grajnoj, kaj posttagmeze revenis kunsako plena de nutraĵoj. En la dometo de la grilo mankis kamero, kaj ili cerbumadis, kien meti la kolektitajn aĵojn, kiam subite aŭdiĝis krio el la korto:

He, formiko! Bofratino! Li estas la edzo de mia fratino – rekonis la formiko la voĉon. - Kion li volas? Ja ili forpelis min, kiam mi petis helpon de ili.

La grilo eliris el la dometo, kaj invitis lin eniri. Tiu eniris, ekvidis la bofratinon apud la plena sako kaj miris. Li kredis, ke la grilo ne havas, kiom manĝi, kaj kuŝas senforta en lito. Se li havas liton, kompreneble...

La formiko demandis: - Kial vi gapas? Diru, por kio vi venis?

La bofrato embarasite balbutis: - Via fratino ... mia edzino diris, ke mi invitu vin loĝi ĉe ni. Ja ĉiuj najbarinoj priklaĉas ŝin, ĉar ŝi lasis sian fratinton loĝi ĉe mizerulo. Estas honto por ni, diris la edzino, ja ni estas riĉaj. Vi povus loĝi ĉe ni ĝis la printempo, ni havas liberan ejon apud la kamero. Tie ne estas tro malvarme eĉ sen hejtado. Venu do, ne hontigu nin antaŭ la najbaroj!

Bone, ke vi havas malvarman ejon por fratino. Por ke oni ne priklaĉadu vin – respondis moke la formiko.

Mi vidas, ke vi kolektadis proviantojn por la vintro. Kunportu vian parton! Per ĝi vi povos pagi al ni lupagon por la loĝejo - diris la bofrato.

Forportu vin, fiulo! Iru hejmen al via samspeca edzino! Diru, ke ŝi eltenu la primokojn, ja vi ambaŭ meritas tion. For! For! Mi ne plu volas vidi vin – kriis la formiko.

La bofrato grumblante foriris. La grilo kaj la formiko aŭdis, kion li duonvoĉe diris: - Stulta virinaĉo!

Ili ridis kaj reiris gaje en la dometon por aranĝi la kune amasigitajn proviantojn. La bofrato foriris grumblante. La formiko ridis, kaj kontenta eksidis ĉe tablo. Ili havis abundan vespermanĝon, ja dum la tuta tago ili vagadis kune en naturo kaj amasigis riĉan provianton.

En la fino de la aŭtuno la suno frue subiras, en la dometo fariĝis mallumo. La maldikaj muroj ne protektis kontraŭ la vespera malvarmo. Vento skuadis la pajlan tegmenton.

- Vi dormu en la lito, mi povos dormi sur la planko. - diris la ĝentila grilo.

Bone, la formiko enlitiĝis, sed ŝi malvarmsentis kaj ne povis endormiĝi. Ja ŝia domo estis varma, en ĝi neniam ŝi frostotremis. Sed nun ĝi estas detruita.

- Venu en la liton, mi malvarmsentas kaj ne povas dormi! - ŝi diris al la grilo, kiu sur la planko vere frostotremis, sed ne plendis. Ja la gasto devas dormi pli komforte en varmo.

Fine ankaŭ la grilo kuŝis en la liton apud ŝin.

Matene la formiko diris:

- Mi frostotremis la tutan nokton kaj miris, kiel vi povas dormi. Tiel ni ne povos pasigi la vintron. Hodiaŭ ni kolektos materialojn por pligrandigi la dometon, plidikigi la murojn. Eĉ lokon por proviantoj vi ne havas. Ni bezonas ankaŭ kameron.

Post matenmanĝo ili ekiris kaj sukcesis amasigi multajn materialojn. Posttagmeze la grilo dikigis la murojn kaj dum la nokto ili ne plu frostotremis. La grilo faris ankaŭ simplan liton por si.

Tiel komenciĝis ilia vivo kune.

Sed la formiko havis novajn projektojn. Anstataŭ la pajla tegmento, ili devas konstrui etaĝon. La domo estos pli granda kaj pli varma.

Bone, la grilo obeis. Komenciĝis la kolektado de materialoj. Kiel bone estos pasigi la vintron en granda, varma domo. La kamero estos lignejo kaj la proviantojn ili portos en ĉambron sur la etaĝon.

La fratino kaj la bofrato rigardis kun envio kiel la domaĉo de la grilo fariĝas granda domo, kia estis la domo de la formiko. La formiko ridis kontenta.

- Vidu, kiel ili envias nin!. Kaj ankaŭ la najbarinoj. Ĉu ne meritis la multan laboron, ke nun ili krevas pro envio? Ha-ha!

La grilo diris nenion.

Nun, ke ili havas kaj bonan loĝejon kaj abundan provianton post multa laboro, li ekmemoris la violonon. Ankaŭ li estis kontenta kaj deziris ĝojigi per muziko ankaŭ la kunulinon. Ĉu ne estas mizere ĝoji nur pri havaĵoj?

Ekstere la neĝo kovris la tutan pejzaĝon kaj ankaŭ tio estis prikantinda beleco. Li komencis serĉi la violonon kaj trovis ĝin – inter la hejtlignoj. La kordoj mankis, musoj formaĉis ilin. La grilo tenis la violonon en manoj kun funebra mieno. „Kiel mi trovos aliajn kordojn dum la vintro?” - li pensis malfeliĉa. La vintro estos tro longa, se mi nur manĝegas kaj ĝojas pro la envio de la najbarinoj.

Tiel lin trovis la formiko.

- Kion vi faras ĉi tie?

La grilo rigardis ŝin malfeliĉe kun la violono enmane.

- Kiel mi povis forgesi ĝin? La musoj formaĉis ĝiajn kordojn.

La formiko ekridis ironie:

- Pro kio vi bezonas violonon? Ja nun vi havas ĉion, vi ne plu estas malriĉa mizerulo. Oni estimas kaj envias vin.

La grilo rigardis ŝin longe kaj ekiris kun la violono eksteren.

- Iru, kien vi volas, idioto! Mi trovos alian kunulon por mia bela domo. Foriru!

La grilo iris, iradis, kaj liajn spurojn baldaŭ kovris abunda neĝfalo.

Zhiqing: La Klera Junularo en la Hejmtero de la Marŝalo - Kantoj kaj Revoj de Junularo



Batalanto

元帅故乡的知青

En la brila kaj varma suno de aŭgusto 1975, malvarma sento kaŝe envolvis la koron de Xiaorong. Ŝi estis junulino kun eksterordinara muzika talento. Ŝiaj muzikaj kapabloj brilis kiel la plej helaj steloj en la orienta nokta ĉielo. Ekde juna aĝo, ŝi profunde sin dediĉis al la artoj de kanto kaj danco, kaj fariĝis la kerno kaj animo de la arteca propagandotrupo de sia lernejo. Danke al sia bona deveno, elstara konduto kaj diligenta lernado, kaj sub la entuziasma rekomendo de sia klasa instruisto kaj muzikaj mentoroj, Xiaorong ricevis la tre deziratan ŝancon partopreni intervjuon kun la instruistoj de la Muzika Akademio. Por okcidentaj legantoj, facilas kompreni ŝian situacion kiel similan al tiu de gejunuloj, kiuj portas artan revon kaj celas eniri prestiĝajn artinstituciojn por pluaj studoj.

La Dongfanghong-a Gastejo en la urbo Wanxian fariĝis la malĝoja loko, kie Xiaorong perdis sian bonŝancon revon. Ŝia familio estis tipa inter multaj ordinaraj ĉinaj familioj de tiu epoko – malriĉa kaj sen rimedoj. En la familio estis ok membroj, kaj nur la modesta enspezo de la patro subtenis ĉiujn. La patrino kuŝis malsana en lito, kaj la junaj gefratoj atendis manĝaĵon. Dum la intervjuo, Xiaorong portis malhelajn, malnovajn kaj eluzitajn vestaĵojn. Du longaj nigraj harplektaĵoj pendis ĝis ŝia lombo. Nur ŝiaj brilaj okuloj – kiel steloj kun mistera potenco el antikvaj orientaj legendoj – brilis pro ŝia persista kredo je la muzikista revo.

La lamento de ŝia patrino, kvazaŭ eĥo el travivita epoko, longe resonis tra la malnovaj stratetoj. Sed la rado de la sorto turniĝis senkompatate. Eble pro la komplika politika situacio tiutempa, aŭ pro tio ke la elektitaj kantoj ne kongruis kun la gustoj de la instruistoj – ili foriris rapide. Xiaorong perdis la eblecon eniri la Muzikan Akademion, kaj ŝia junula revo forvaporigis tuj, kvazaŭ krevigita sapveziko en okcidenta fabelmondo. Tamen, Xiaorong ne kapitulacis antaŭ la furioza ŝtormo de la sorto. Kun la forta kredo je “unu koro de ruĝeco, du pretigoj”, ŝi, tiam 17-jara, kuraĝe forlasis la urbon Wanzhou kaj iris al la vasta, nekonata kamparo de Kaixian – kvazaŭ brava orienta soldatino. Ŝia alveno estis kiel freŝa vento el la oriento, penetranta en la malnovajn kaj fermitajn vilaĝojn kaj en la simplajn korojn de la vilaĝanoj.

“Ĉi-jare la oranĝoj — kio! — bonege rikoltiĝis! La Zhiqing-junuloj venis al la kamparo, kaj ni, la malriĉaj kamparanoj — kio! — venigis ilin!” Kantoj kaj tamburoj kuniĝis, kvazaŭ mirinda melodio el la interfandiĝo de orienta kaj okcidenta kulturo. La Zhiqing-junuloj estis tiel emociiĝintaj, ke larmoj ruliĝis el iliaj okuloj.

Kiam Xiaorong alvenis al Kaizhou, antaŭ ŝia okulo estis nekonata kaj defia medio. La malproksima vilaĝeto havis malbonajn lutajn domojn kaj malfacile transireblajn stratojn. Ne ekzistis la elektrolumoj kaj la akvopipo kiel en la okcidenta socio, nur la malklara petrolumo brilis kiel la fajro de la orienta saĝo, svingante la lumon de la espero.



Xiaorong ne malfortiĝis. Ŝi rapide adaptiĝis al la kampara vivo kaj laboris kune kun la vilaĝanoj en la kampoj. Dum la riza plantado, ŝia kliniĝa pozicio estis kiel la plej bela orienta pentraĵo; dum la rikolto, ŝiaj manoj esprimis la ĝojon de la rikolto, kvazaŭ la laboraj scenoj en la okcidentaj oleopentraĵoj. Dum la ripozo, ŝi organizis artecajn agadojn kun la gejunuloj de la vilaĝo kaj brilis la noktojn de la vilaĝeto per sia varmo kaj talento. Ŝi estis la prezidantino de la Komunista Junulara Ligo kaj la arteca komisionino de sia lernejo, kaj la kapabloj pri kanto kaj danco montris al la vilaĝanoj la aliajn aspektojn de la urbaj *Zhiqing* – junuloj, kvazaŭ la alportantoj de novaj ideoj kaj nova kulturo en la okcidenta kulturo.

Kontraŭ la sekeco, porti manĝaĵon al la monto, ripari terasojn, konstrui akvorezervujojn... Tra la malfacilaj kaj pezaj korpaj laboroj, Xiaorong neniam plendis pro la malfacileco. Ŝi kunhavis la gajnojn kaj malgajnojn kun la vilaĝanoj, manĝis maizon, batatajn kaj terpomojn, kaj kune alfrontis la malfacilaĵojn kaj kune kreis la vivon. Ŝia fortiko, optimismo kaj ŝparemo estis kiel orienta lumo, kiu brilis en la koroj de la vilaĝanoj kaj gajnis ilian respekton kaj amon.

Post la taga laboro, dum la nokto Xiaorong laboris pri la artecaj kulturaj agadoj. Kiam la suno subiris kaj la malvarmeta vento blovis, en la kampo de la popola komuna komunumo, ŝi recitadis la poemon “Kredas la estontecon” kun sento:

“Kiam la aranea reto senkompatate fermis mian fornon,
kiam la fumrestoj de la cindroj plendis pri la malriĉeco,
mi ankoraŭ obstine planis la cindron de la seniluziigo
kaj skribis per belaj neĝfloktoj:
Mi kredas la estontecon!”



Vera Xiaorong kiam ŝi estis 17-jara

Tiu voĉo trapasis la nokton kaj varmigis ĉiun koron, kvazaŭ la poemo el la okcidenta mondo, kiu transdonas esperon kaj forton.

Post kelkaj jaroj da senĉesa penado, la vilaĝeto tute ŝanĝiĝis. La oraj ŝveboj ondis kiel la brilaj koloroj en la okcidentaj impresionismaj pentraĵoj; la brasikoj brilis, la oranĝoj estis dolĉaj kaj sukoplenaj, kaj la arakidoj kaj la sukerkanoj kreskis forte en la ebena tero. La ĝojo de la rikolto disvastiĝis en la aero, kaj la radio de la vilaĝo sonoris la melodion de “Bonege estas la socialismo”. La ridoj de la vilaĝanoj estis brilaj kiel la suno. Ĉio ĉi montris la bonajn rezultojn de la kolektiva laboro kaj penado.

Post tri jaroj, Xiaorong kreskis el juna knabino al forta virino. Ŝi lernis vivi sola kaj komprenis la respondecon de la vivo.

Kiam venis la ŝanco reveni al la urbo, ŝi forlasis kun malĝojo kaj dankemo ĉi tiun teron, kiu donis al ŝi kreskon, kaj ĉi tiujn simplajn vilaĝanojn. Ŝi sciis, ke ĉi tiu sperto estos ŝia trezoro dum la tuta vivo, kvazaŭ la valoraj spiritaj trezoroj, kiujn la ĉefuloj en la okcidentaj literaturoj akiris post la suferoj.

Multajn jarojn poste, Xiaorong revenis al Kaizhou kun sia familio. La antaŭa vilaĝeto tute ŝanĝiĝis, kaj la vilaĝanoj restis simplaj kaj amikaj. Inter la montoj, la melodio de “Bonege estas la socialismo” refoje sonoris laŭte el la radio. Ŝi sentis multajn sentojn. La *Zhiqing*-generacio de la Popola Respubliko, ilia amo al la patrio, al la tero kaj al la kamparanoj, ilia deziro kaj persisto al la bona vivo, estas kiel neforgesebla kanto, kiu ĉiam resonos en ĉiuj partoj de la patrio.

La vera rakonto de Xiaorong estas la resumo de la epoko de la *Zhiqing*-junuloj, kiu instigas la venontajn generaciojn konservi la kredon en la malfacilaĵoj, realigi la valoron en la penado kaj skribi sian prosperan ĉapitron per optimismo kaj fortikeco. Ĝi purigas la animojn de homoj, altigas la pensadon kaj la moralon de homoj kaj igas nin kredi, ke se ni havas esperon kaj amas la vivon, la estonteco certe estos bona. Ĉi tiu vera rakonto transpasas la diferencojn inter la orienta kaj la okcidenta kulturo kaj montras al la mondo la spiriton kaj la grandajn kvalitojn de la ĉinaj *Zhiqing*-junuloj.

知青



小蓉

Vera Xiaorong kiam ŝi estis 18-jara

Pri toleremo

Laimundas Abromas



La bombo...fulmotondro... edzino... - estas ege teruraj vortoj. Ni ŝajnegas, ke amas unu la alian. Tio ne estas tro malfacila afero. Plej gravas- ne tro emociiĝi. Tamen tiaj agoj ne kondukas al bono.

Iun sabaton mi sidis ĉe la tablo, apud la fenestro. Trans la fenestro tondris kaj la fulmoj, eksterordinare klaraj kaj tuj malaperantaj, ekbriladis en la fenestro kiel malbonon antaŭdirantaj signoj. Finfine komencis pluvi. Grandaj gutoj falis kaj frapetadis la fenestrajn vitrojn.

Mi sidis ĉe la tablo kaj verkis humuraĵon. Ĝin verki ne estas afero facila, tamen por mi agrabla.

-Mateo, pro kio vi perdas la tempon vane?- neatendite diris al mi mia edzino. -Forlasu vi tiun Esperanton, ĉesu vi tiun vian verkadon. Por vi nek mono, nek gloro.

-Vi pri kio temas ĉi tie? -mi demandis, kvankam mi tuje komprenis, kion ŝi intencas.

-Ĉar neniu legas tiujn viajn humuraĵojn, -daŭrigis sian paroladon mia virino ,apud mi starante kun la manoj surkokse.-En nia urbo estas nur du kaj duono da esperantistoj. Tiu Dominiko, via rondgvidanto, tiu oldfraŭlino Veroniko, via sekretariinaĉo kaj vi, verkistaĉo, duonesperantisto. Ĉiuj ceteraj - eternaj komencantoj. Ili nur trumpetadas, ke Esperanto estas la plej facila lingvo. Tamen mem ili nek legas, nek parolas ĝin, nur balbutas. Kaj mem esperantistoj estas senhumuraj.

Mi malfermis la buŝon. Kion respondi al tiu stulta virinaĉo? Kion paroli al ŝi? Ol la diablo ŝi malbonas pli. Plej malbonas, ke mi al neniu povas plendi. Mi multfoje tion aŭdis, eĉ inter la esperantistoj mem, ke esperantistoj ne posedas humursenton.

Mi parolas al neniu pri mia supozo, ĉar mi timas esti priridita, tamen mi ĝin posedas. Ne tre grandan, ne indas pri tio fanfaroni, tamen tutegele mi ĝin posedas. Mi posedas humuran senton kaj estas esperantisto.

Ne povas esti, ke inter tri milionoj da esperantistoj mi estus sola, kiu posedas tiun senton. Mi konas kelkajn dekojn da esperantistoj, kaj tiuj posedas tiun senton. Unuj pli fortan, aliaj malpli fortan, tamen posedas. Mi legis multajn librojn, kies aŭtoroj Baghy, Schwartz, Lejzerowicz, Beaucaire, Devjatnin kaj multaj aliaj bone sentas tiun humuron...

Mi nervozigis, tamen al mia edzinaĉo mi nur diris:- Vi cerbumu , pri kio vi parolas.

-Vi iĝu alia homo, vi ŝanĝiĝu, - responde rediris ŝi.- Mi scias, iuj sukcesas.



Kaj ŝi tuj forprenis la okulvitrojn de sur mia nazo. Tion ŝi faris tiel lerte, ke mi eĉ ne rimarkis. Kaj la mondo antaŭ miaj okuloj tuj malheliĝis. Vere, mi ankoraŭ provis kontraŭi, sed miaj penoj estis vanaj. Kaj entuziasmo, kaj kolero miaj jam estingiĝis. Proksimiĝis la tempo de ĉiutaga pacienco. Pro tio enpense mi sendis ŝin sur tri literoj finante ruslingve kaj nur diris:

-Kie estas via toleremo?

-Vi estas stultulo, ĉu ne?, - demandis ŝi. -Tamen neniu nomas vin tia! Jen, kaj tio estas toleremo!

Mi nenion plu diris al ŝi. Kion mi povis respondi? Ke miaj personaj aferoj ĉi tie ne gravas? Afero estas en tio, ke mi devenas de mizeruloj, pro tio mi estas singarda, kiel rubaĵeja kato. Ĉu mi estas stulta nur pro tio, ke mi ne similas al aliaj... la veraj frenezuloj? En mia parencaĵo ĉiuj estis stultaj, strangaj. Ekde pratempo. Kaj mia avo, kaj praavo, kaj prapraavo, estu por ili la reĝlando ĉiela. Kiel stultuloj ili laboris, kiel stultuloj ili amis, kiel stultuloj ili dion adoris. En mia infanaĝo, estadis, mi kure revenas hejmen kaj plendas al mia avo: „Ĉiuj infanoj primokas min, nomas min stultulo“. „Kaj vi, Mateo, pro tio fieru! La plej bona nomo en la mondo estas ne reĝo, ne generalo, ne negocisto, sed stultulo. Vi fieru! Baldaŭ venos la festo por stultuloj de la tuta mondo.“ – diradis al mi mia avo.

Mi nervoziĝis. Mi volis ekinteresiĝi mian edzinon pri io, tamen mi ne sciis kiel. Venis la tempo por ligi seriozajn interrilatojn kun ŝi. Ne dio aranĝas liton, sed virino.

-Ĉu vi volus kune kun mi vakciniĝi?- mi kuraĝis demandi ŝin.

Mi pensis, ke ŝi ekĝojos... Tamen ŝi konfuziĝis, apenaŭ ne ekploris.

-Mi jam delonge volis diri al vi... Mi jam vakciniĝis. Kun Staseo.

Staseo estas nia najbaro. Serioza homo.

-Ĉu vi koleras? – ŝi demandis .

-Se tio okazis nur unu fojon... Mi pensas, ke mi povus kompreni,- post kurta paŭzo respondis mi.

Ŝi ekrigardis al fenestro. Trans fenestro ankoraŭ pluvigis.

-Trifoje, - ŝi diris mallaŭte.
 -Ĉu ankaŭ la aldonan, plifortigan injekton vi akceptis?
 Mia edzinaĉo kapjesis. „Sekve, longdaŭraj interrilatoj“, - eknestis en mia kapo.
 Io pikis mian koron.
 -Ĉu kun li plibonas?, -mi komencis koleri.
 -Ne pro tio...
 -Sed pro kio?
 -Ĉu vi memoras... Multfoje mi petis vin: „Ni vakciniĝu!“ Vi ĉiam returnadis al mi
 vian dorson.
 -Tamen ĉu vidis vi, ke mi laboras, ke mi verkas, ke mi estas laca, - mi provis
 pravigi min.- Ne tio enkapis!
 -Vi tute ne rimarkas min.Vi bezonas nur Esperanton, - ŝi plendis.
 Sento de la kulpo pikis mian koron.
 -Do, vi vakciniĝis... kaj ĉio?
 -Jes, -kapjesis ŝi. – Inter ni estis nenio serioza.
 -Ĉu vi almenaŭ singardis?
 -Ĉio okazis tiel rapide...
 -Kaj se aperos tiuj...,- mia voĉo komencis tremi. – Nu, tiuj... antikorpoj...
 -Mi foriros... Al arbaro, - ŝi respondis tuje, senhezite.
 -Kion vi parolas! – mi svingis permane. –Mi zorgos pri ili, kiel pri miaj , propraj...
 Edzino ĉirkaŭbrakis min. Mi premis ŝin al mia koro. Tamen se komenci ĉion
 denove,necesas scii ĉion.
 -Sed rapidaj testoj?
 Ŝi neis perkape.
 -Vere ne! Staseo, kompreneble, volis... Unufoje eĉ en vendejo!
 „Nu, tiu silentulo najbaro! Tiu Staseo! Mi eĉ ne suspektus lin...“
 -Sed la flankaj fenomenoj? , - mi ne cedis.



-Nu..., - sinĝene ridetis mia virinaĉo,- por la unua fojo estis ioma ekscitiĝo,
 tremo, ruĝiĝo... Unumomente eĉ gamboj rezignis, forlasis fortoj. Sed kiam mi falis sur
 liton, ĉio pasis.
 Mi pli facile ekspiris. „Eble vere okazis nenio serioza ?“
 Ni ĉiuj posedas mankojn.

LA MONDO, KIUN NI VIDAS

/mikronovelo/

Rita (Hripsime) Mkrtĉjan



Li estis tre aktiva en sociaj retoj.

Preskaŭ ĉiutage li verkis, enmetis en sian paĝon poemojn, citaĵojn.

Li priskribis belecon de neĝaj montoj, de sia lando, rakontis pri antikvaj memorindaĵoj, pri florantaj arboj printempe, kaj post ĉiuj strofoj legantoj ĝuas belajn fotojn.

Li havis multajn geamikojn, partoprenis en komentoj, rakontadis pri sia bonega vivo, pri la lando, invitis viziti la urbon, ekkoni lian patrujon.

En tiu tago en la ĉambro iĝis malvarme kaj li alvokis filon fermi la fenestron.

-Verŝajne, hodiaŭ pluvos, mi sentas odoron de aŭtuno,- diris li al la filo.

-Ĉu vi diktos al mi novan poemon?- kun kareso en voĉo demandis filo.

-Jes, nepre. Mi “vidas” belegan folifalon en nia ĝardeno.

La filo helpis, ke blinda patro alproksimiĝu kaj sidu apud li ĉe la komputilo.

Komenciĝis nova tago de ĉiama, jam kutima vivo.



Vera amo



De *Honoré Sebuhero*

Unu tagon instruisto de psikologio eniris en la ĉambron, kaj diris al siaj studentoj: Ni ĉiuj ludu!

La instruisto petis volontulon por la ekzerco.

Virino sin prezentis.

La instruisto petis ŝin skribi sur la tabulo la nomojn de tridek plej gravaj homoj de ŝia vivo.

La virino skribis la nomojn de siaj proksimuloj, parencoj, amikoj, kolegoj kaj najbaroj.

La instruisto petis ŝin forviŝi tri nomojn, kiujn ŝi konsideris malpli gravaj.

La virino forigis la nomojn de ŝiaj kolegoj.

La instruisto denove petis ŝin forigi kvin aliajn nomojn.

Ŝi forĵetis la nomojn de siaj najbaroj.

Li daŭrigis la manovron, ĝis estis nur kvar nomoj sur la tabulo.

Ĉi tiuj estas la nomoj de ŝia patrino, ŝia patro, ŝia edzo kaj ŝia filo.

La tuta klaso silentis, rimarkante, ke tio jam ne plu estas ludo por la virino.

Nun la instruisto petis ŝin forigi du aliajn nomojn.

Tio estis tre malfacila elekto por la virino.

Ŝi forigis la nomon de ŝiaj gepatroj.

Mi petas! Forigu unu pli, demandis la instruisto.



La virino tre nervoziĝis kaj, kun tremantaj manoj kaj larmoj en siaj okuloj, ŝi forigis la nomon de sia filo.

La virino ploris dolore.

La instruisto tiam petis lin sidiĝi.

Post iom da tempo, la instruisto demandis:

Kial vi tenis vian edzon? Ĉu la gepatroj ne naskis vin kaj nutris vin, kaj via filo ne estas la frukto de via ventro? Kaj vi ĉiam povas trovi alian edzon, ĉu ne?

Estis tute silento en la klasĉambro.

Ĉiuj scivolis scii ŝian respondon.

La virino diris trankvile kaj malrapide:

Iam, miaj gepatroj povos morti antaŭ mi. Mia filo povos ankaŭ lasi min kreskante pro siaj studoj aŭ siaj komercoj, aŭ pro ia ajn kialo. La sola kiu vere dividos sian vivon kun mi, estas mia edzo.

Ĉiuj studentoj stariĝis kaj aplaŭdis ŝin por dividi ĉi tiun veron de la vivo. Estas vera, kaj tio estas fakto de la vivo. Dio kreis geedzecon por ĉiuj. Ĉiam valoras vian vivan kompanon. Ĉi tio ne nur validas por edzoj, sed ankaŭ por virinoj. Dio kunigis ĉi tiujn du animojn kiel unu, kaj oni devas nutri ĉi tiun rilaton, antaŭ kiun vi havas kun amikoj, amatoj kaj la familio.

Antaŭ la geedziĝo, Dio superas, tiam la gepatroj venas due.

Post geedzeco, Dio prenas precedencon, tiam la edzino venas dua.

Ankaŭ, kiel paro, ĝuu vian geedziĝon kaj faru ĝin sana, verama, paca, estimata, religia, romantika kaj envidinda. Fine, ĉi tio estas plifortigi la unuiĝon en la paroj.

Sonĝo

Rita (Hripsime) Mkrtĉjan



La sonĝo estis tre obstina, ĝi revenadis kaj devigis Lin rideti, eĉ laŭte ridi dum la dormado.

Li sonĝis sin, tiun gajan celkonscian junulon, kiu per motorciklo provis "preterpasi" la venton.

Finiĝas la sonĝo ĉiam per la sama "bildo".

Li akompanis hejmen belegan junulinon kaj donacis al ŝi ne florbukedon, sed blankan katidon.

Li pensis, kuŝante en la lito;

-Vivo ofte faras sian "donacojn" al multaj homoj,

liuj suferas pro malsanoj, iuj pro kruelaj doloroj, iuj pro tragikaj eventoj en la mondo, iuj pro forpasoj de gekaruloj.

Sed feliĉaj momentoj en la sama vivo okazis, aŭ okazas ĉe ĉiu homo.

Ĉi-matene feliĉa sento pro la sonĝo daŭris eĉ kiam Li vekigis.

"Feliĉa" sonĝo havis respegulon en kara vizaĝo de edzino, en trilo de birdoj tra fenestro, en varmaj vortoj de geamikoj, en bela printempa tago, kiu sunigis tutan ĉambron.

Li pensis, kion Li deziras pli ol ĉi-tio, eble... nur tiun ĉarman katidon el la sonĝo, kiu ekkuŝus apude kaj rigardus Lin per fidela, karesa rigardo.



Ĝena floropresita robzono

Yin Jiaxin



Mia amiko sinjoro Lin servis kiel asistanto de ĝenerala direktoro en ŝtata kompanio por eksterlanda komerco. Antaŭ dekado, li subite prezentis rezignon kaj funkciigis vestaĵbutikon. Mi demandis al li, kial li rezignis la prestiĝan postenon por fariĝi privata komercisto. Li amare ridetis kaj rakontis al mi sian historion:

Antaŭe mi estis direktoro de filio de nia kompanio. Mia laboro sufiĉe bone progresis. Post kelkaj jaroj da peniga laboro, mi akiris plurajn konstantajn klientojn, kaj la negocokvanto de la filio rapide kreskis kun bona profito. Tiutempe mi sentis min tre kontenta. En somero antaŭ tri jaroj, meksika kliento sendis al mi faksmesaĝon, petante kune starigi vestaĵfabrikejon por certigi la liveradon. Kiel filia direktoro, mi ne rajtis decidi pri tia afero. Do mi telefonis al la ĝenerala direktoro por difini redevuon diskuti pri la kunlaboro. Ĉiufoje la ĝenerala direktoro diris, ke li estas okupita kaj ke ni parolu pri tio post kelka tempo. Mi respondis al la kliento, ke lia propono estas grava kaj la estraro de nia trunka kompanio estas pripensanta ĝin.

Post nelonge, la kliento denove sendis faksmesaĝon demandi pri la kunventura projekto. Je la krepusko de tiu tago kiam mi rehejmiĝis de laboro per buso kaj preterpasis la trunkan kompanion, mi rimarkis la aŭton de la ĝenerala direktoro parkita ĉe la enirejo. Mi pensis, ke en tiu momento estas bona ŝanco raporti al li, sekve mi descendis de la buso kaj iris al lia oficejo.

Mi frapis je la pordo de lia oficejo kaj aŭdis bruon interne. Daŭre frapante, mi aŭdis ke knaras la pordo de la klozeto. La pordo malfermiĝis, kaj la ĝenerala direktoro ŝajnis konfuziĝi iomete kun ruĝmakulo sur vango. Mi senintence ĵetis rigardon al la fermita klozeto kaj surprize ekvidis pecon de floropresita robzono sub la pordo. Tuj mi komprenis, kion la direktoro ĵus faris en la oficejo. Verŝajne mi alvenis en malĝusta momento!

Baldaŭ la direktoro jam sereniĝis kvazaŭ nenio okazus, tamen li tute ne povis kaŝi la maltrankvilon kaj kolereton en liaj okuloj.

Post la Printempa Festo de la sekvanta jaro, la estraro nomumis min kiel asistanton de la ĝenerala direktoro, respondeca pri la oficejaj aferoj kaj la dokumenta sekcio. Tio estis promocio por mi, sed fakte sur tiu posteno mi havas nenion fari. Ĉar mi ne plu okupiĝis pri komercaj aferoj, mi devis transdoni la klientan reton, kiun mi pene konstruis dum jaroj.

Kiam mi eklaboris en la trunka kompanio, fraŭlino Feifei el la dokumenta sekcio komencis intimigi kun mi. Ŝi ĉiutage flataĉis min, laŭdante mian altnivelon de la angla kaj lertecon pri eksterlanda komerco. Ŝi diris, ke ŝi ĉiam deziris lerni de mi por plibonigi sian anglan, sed antaŭe ne havis oportunecon ĉar ni ne laboris kune. Nun, mi fariĝis ŝia rekta superulo, kaj ŝi povas facile konsulti min, ktp.

Vere, fraŭlino Feifei tre fervore lernis la anglan. Preskaŭ ĉiutage ŝi venis al mia oficejo por konsulto. Komence ŝi demandis nur pri la angla kaj foriris tuj post mia klarigo. Sed iom post iom ŝiaj demandoj fariĝis pli kaj pli diversaj, foje preskaŭ ŝanĝiĝante al bagatela babilado. Ŝi ĉiam venis ĝuste antaŭ la laborfino por babili pri anglalingva lernado, pri komercaj scioj, poste pri ŝiaj amikoj, hobiaj, libertempa vivo, kaj eĉ pri ŝiaj vivfilosofio, sociaj opinioj kaj amkonceptoj. Kiam ŝi ekparolis, ŝi preskaŭ neniam volis ĉesi, ofte daŭrigante post la oficaj horoj.

Kelkfoje mi atentigis ŝin ne tro deturniĝi de la temo, sed ŝi ŝajnis tute ignori miajn rimarkojn kaj daŭrigis kiel antaŭe. El la koro mi enuigis de ŝi.



Iun vesperon kiam mi iris viziti amikon, mi renkontis fraŭlinon Feifei surstrate. Ŝi portis belan robon, kiun mi neniam antaŭe vidis ŝin surhavi. Strange, tuj kiam mi ekvidis tiun robon, ĝi ŝajnis al mi tre familiara. Subite mi memoris - la zono de tiu robo estis absolute identa kun tiu, kiun mi vidis en la oficejo de la ĝenerala direktoro! Tiam mi komprenis ĉion kaj tuje ekkomprenis la veran kialon, kial fraŭlino Feifei tiel persisteme algluiĝis al mi - ŝi havis kaŝitan intencon, kiu estas malica kaj insida!

Ekde tiam, mia antaŭa ĝeno pri fraŭlino Feifei ŝanĝiĝis al timo. Mi laŭeble evitis ŝin, malproksimiĝi de ŝi kaj esti singarda ĉie. Tamen, ĉia singardo montriĝis vana. Iun tagon, la kompartia sekretario vokis min al sia oficejo kaj tre severe informis min, ke iuj en la kompanio denuncis, ke mia rilato kun fraŭlino Feifei estas “nekutima”. Li konsilis al mi atenti rilaton kun koleginoj por ne difekti mian karieron. Sed kiel mi povus esti pli singarda? Mi evitadis fraŭlinon Feifei kvazaŭ peston, dum ŝi persekutis min kiel muŝo!

Poste, eĉ mia edzino eksuspektis mian rilaton kun fraŭlino Feifei. La kalumnioj vere efikis. Mi devis peti revenon al mia antaŭa filio, sed la sekretario kaj ĝenerala direktoro diris, ke ne estas vaka gvida posteno en la filioj. Mi eĉ proponis fariĝi ordinara komercisto en filio, sed ili respondis, ke estas tro strange malaltigi estraron al simpla komercisto sen kialo. Ĝuste tiam la urba registaro postulis, ke ĉiu unuo sendu homojn por helpi kamparanojn elmalriĉiĝi, emfazante ke la teamestro devas esti estrano. Do la estraro decidis min kun du aliuloj plenumi tiun taskon.

La estraro promesis, ke post unu jaro mi povos reveni al mia origina posteno. Tamen, apenaŭ kelkajn tagojn post mia foriro, ili jam nomumis novan asistanton por anstataŭi min. Kiam la jaro finiĝis, la du kunuloj revenis al siaj antaŭaj postenoj, sed mi restis senpostena. La estraro metis min en oficejon por legadi ĵurnalojn kaj trinkadi teon - tiel nomate “en atendo de postenigo”. Kiam mi petis al la estraro asigni taskon al mi, ili ĉiam prokrastis al la sekvanta, sekvanta kaj senfina sekvanta tago.

Post pripensado mi konkludis, ke en tiu kompanio mi havos mornajn perspektivojn. Por plenkreska viro, tia sensenca vivado ne estas akceptebla. Transiri al alia kompanio? Dum la pasintaj du jaroj sen komercaj taskoj, mi jam perdis mian klientan reton, kiu estas mia kapitalo. Mi devos komenci absolute de nul. Ĉu vivanta homo povus morte sufokiĝi pro manko de elirejo? Estas pli bone eliri kaj klopodi memstare. Tiel mi forlasis la ŝtatan kompanion.

La Domo de la Koro

Nathan Sena



En bunta vilaĝo, la eta Ana loĝis kun sia familio: panjo, paĉjo, avo kaj ŝia frateto Dudu. Iun tagon, Ana desegnis domon kaj diris: "Jen la Domo de la Koro, kie ĉiu gravas!"

Sed Dudu skribaĉis sur la desegno kaj Ana koleris. Avo vokis ŝin al la angulo kaj diris:

— Ĉu vi sciis, ke ĉiu persono ĉi tie estas kiel parto de la domo?

- Kiel ĉi tio? — Ana demandis.

— Panjo estas la tegmento kiu protektas. Paĉjo estas la muro, kiu vin subtenas. Mi estas la grundo, kiu provizas bazon. Kaj Dudu... ĝi estas la malgranda fenestro kiu alportas ĝojon!

Ana rigardis la skribaĉon kaj vidis ridetantan sunon, kiun Dudu desegnis.

Ŝi brakumis sian fraton kaj diris:

— Pardonu, Dudu. La Domo de la Koro ne estas kompleta sen vi!

Ĉiu persono en la familio havas sian propran unikan valoron. Kune, ili formas fortan, feliĉan kaj aman hejmon.





La Puzlo de Feliĉa Domo

Nathan Sena

En bunta dometo loĝis Nina, feliĉa knabino, kiu amis solvi puzlojn. Iun tagon, ŝi ricevis novan: ĝi estis la bildo de domo kun familio interne. Sed kiam ĝi estis finita... mankis kelkaj pecoj!

Ŝi serĉis ĉie. Ŝi trovis la pecon de sia patrino en la kuirejo, helpante kun la manĝeto. Paĉjo estis en la korto, riparante la biciklon. Ŝia frateto, en la ĉambro, legante libron kun ŝi. Ĉe avino, sur la sofo, kun varma brakumo.

Kiam ĉiuj pecoj kuniĝis, la bildo estis kompleta kaj plena de ridetoj. Nina ridetis kaj diris: "Ĉiu en mia familio estas grava parto de mia koro!"

Ĉiu familiano havas specialan rolon. Kiam ili estas kune, ili formas hejmon plenan de amo, kiel perfektan puzlon.



Ario de juneco

Yin Jiaxin

Daŭrigante la enhavon de numero 001



Ĉapitro 3 Gen Men rakontas

Ĉe la statuo de belulino sur Junularo-placo de la urbo Sijan staris granda ligna tabulo, sur kiu estas skribite: English Corner (Angulo por la angla lingvo). Ĉirkaŭ la tabulo troviĝis pluraj homamasoj. Mi pensis, ke mi alvenis tre frue, sed mi trovis ilin pli fruaj. Proksimiĝinte al homamasoj, mi rimarkis, ke la plejparto el la homoj estas gejunuloj. Ĉi tie oni parolis en la angla. Kaj la etoso estas varma. Mi parolis la anglan kaj klare kaj flue. Baldaŭ multaj homoj ĉirkaŭis min. Ni diskutis pri diversaj temoj. Iu knabo demandis min: “You speak English well. Would you please tell me what you are? (Vi parolas la anglan bone. Bonvolu diri al mi, kio vi estas?)”

“I’m a teacher of English. (Mi estas instruisto de la angla.)”

Poste mi prezentis min al ili, ke mi nomiĝas Gen Men, mia naskiĝloko distancas de ĉi tie pli ol kvincent kilometrojn, mi diplomiĝis de fakto de la angla en 1984 kaj laboras en mezlernejo jam du jarojn.

La knabino kun bruna vizaĝo kaj maldika staturo demandis al mi, ĉu mi estas daŭre memstudanta la anglan en libera tempo; kaj petis min paroli pri metodoj de memstudado. Ŝi aspektis vigla kaj ĉarma en helblua mallongmanika T-ĉemizo kaj neĝblanka minijupo. Mi konsideris ŝin mezlernejano. Mi diris al ŝi, ke mi ĉefe legas diversajn librojn post laborhoroj kaj mi estas membro de “Paca Legsalono”.

“Paca Legsalono?” Ŝiaj okuloj ekbrilis, kaj tiam mi rimarkis ke ŝi havas miopajn okulojn, kvankam ŝi ne portas okulvitrojn. Ŝi interesiĝis pri la legsalono kaj faris multajn demandojn pri ĝi.

La aktiveco de “English Corner” okazis ĉiun dimanĉan vesperon. En la sekva dimanĉo mi biciklis al la placo kaj tiu knabino ankaŭ estis tien. Dum la babilado, ŝi elmetis al mi kelkon da demandoj pri “Paca Legsalono”. Je la naŭa horo kaj duono, finiĝis la aktiveco de “English Corner”. Rajdonte la biciklon mi aŭdis iun voki postdorse. Mi turniĝis kaj vidis, ke estas tiu knabino. Ŝi ridetante vokis: “Instruisto Gen, nu...”

“Kio estas?”

“Mi volas partopreni vian legsalonon, aŭ almenaŭ aŭskulti, ĉu bone?”

“Vi? Ĉu vi ne estas mezlernejano? Nia legsalono sin limigas per ok aŭ naŭ membroj, ne kiu ajn licas partopreni ĝin. Komprenoble ĝi ne akceptas mezlernejanon.”

“Mi ne estas mezlernejano. Mi estas triajarulo en Sijana Medicina Universitato.”

“Ho. Mi pensis, ke vi estas lernanto de proksima mezlernejo.” Por paroli honeste, mi vere ne atendis, ke ŝi estas trijara universitata studento.

“Ankoraŭ mezlerneĵano? Mi jam havas dudek unu jarojn.” Ŝi levis la kapon, evidente iom malkontenta pro mia subtakso pri ŝi.

“Sed vi ne aspektas tiel aĝa,” mi kun iomete da bedaŭro diris. “Bone, mi unue demandos aliajn membrojn, ĉu ili aprobu. La legsalono funkcias sabate vespere, en mia ĉambro. Kiel mi kontaktos vin? Ĉu troviĝas telefono en via pensiono?”

“Mia familio loĝas en la medicina universitato. Vi disku 52030, tio estas la telefona numero de mia hejmo. Mi nomiĝas He Lei.”

Ho, ŝi estas filino de fama profesoro He!

Sabate vespere, ŝi alvenis, vestita en malhelverda robo kun mezlongaj haroj, aspektante digna kaj trankvila.

Komenciĝis la legsalona aktiveco. Unue la preleganto prezentis la libron 《Pri sociaj rilatoj》. Due li elmetis kelkajn demandojn por ni diskuti. La plej vigle diskutitaj demandoj estis “persono kaj socia medio” kaj “kiel opinii pri rilataj retoj”. La diskutado estis tre intensa. Iuj argumentis jene: ĉar ekzistas rilataj retoj en la socio kaj ili fariĝas pli kaj pli vastaj kaj gravaj, do ili havas siajn raciecon kaj necesecon; La aliaj jene: rilataj retoj ekestas pro la neperfekteco de la socia sistemo; se ĉiuj sekvus socian principon helpi unu alian, kaj ĉiuj estus altruistoj, tiam rilataj retoj ne plu necesus; ekzisto de rilataj retoj estas malbona fenomeno; kun disvolviĝo de la socio kaj la konstanta pliĝustiĝo de personaj konceptoj, tia fenomeno devas esti laŭgrade forigita; koncerne la rilatojn inter persono kaj socia medio, oni ne devus nur vidi la malfortecon de unuopa persono; unuopaj personoj organizitaj kune povas ŝanĝi la socian medion kaj antaŭenigi la socion.

Kiam oni diskutadis entuziasme, mi kviete avertis al He Wei, kies buŝo restis fermata, ke ŝi diros ion.

Ŝi modeste ridetis, ordigis siajn harojn kaj ekparolis: “Pri rilataj retoj, ĉar mi estas studento, mi komprenas nemulte, mi scias iomete el ĵurnaloj kaj radioj, do mi ne povas esprimi mian opinion. Pri la rilato inter persono kaj la socia medio, mi havas ideon. Kompreneble, mi ankoraŭ ne eniris la socion, do ĝi eble ne estas ĝusta.”

Ŝi eksplikis sian ideon dum kelkaj minutoj.

Kiam He Lei finis sian parolon, iu knabino admie diris: “Laŭ viaj vortoj, mi asertas ke vi estas kadro de la Studenta Asocio, ĉu?”

“Ne, mi simple estas ‘popolano’ en la universitato.”

“Vi certe estas kapabla, ĉu?” mi laŭdis.

“Mi ne volas esti malfortulo.” Ŝi ne rekte respondis min.

Estis du vojoj antaŭ la pordo de mia lernejo, la membroj hejmeniris laŭ la dekstra vojo, sed He Lei unuope devis trapasi tunelon longan je ducent metroj antaŭ ol hejmeniri. La aktiveco de tiu vespero finiĝis malfrue, preskaŭ je la dek unua horo. Mi maltrankvilis kaj intencis akompani ŝin hejmen. Ŝi malstreĉite diris: “Ne gravas. La universtato estas nur unu bushaltejo for. Tamen, la tunelo estas iom timiga, instruisto Gen, vi akompanu min ĝis ĝia elirejo.”

Sur la vojo tra la tunelo, mi demandis al ŝi, kiel ŝi sentis la legsalono. Ŝi ekscitiĝe diris: “Estas bonege. Ĉiuj estas viglaj, kuraĝaj pensi kaj paroli, kun novaj ideoj. Mi ne atendis, ke en ĉi tiu angulo estas tia bona loko. Mi venos denove, ĉu mi povas longe partopreni ĝin? Mi ankaŭ ŝatas legi amplekse.”

“Tamen, vi ne nur aŭskultu, sed ankaŭ estu proleganto. Ni viciĝas kiel preleganto.”

“Bone, atendu ĝis vi ĉiu finos vian vicon.”

“Ĵus ni aranĝis, ke la venontan fojon ni diskutos la verkojn de Sanmao (Echo) kaj Chiung Yao, ĉu vi legis iliajn verkojn?”

“Mi legis kelkajn. En nia universitato, precipe inter knabinoj, furoras noveloj de Chiung Yao, ili ne multe legas la verkojn de Sanmao. Sed mi ŝatas la verkojn de Sanmao.”

“Kiel vi rigardas la verkojn de Sanmao kaj Chiung Yao?” Tio estis la demando por la venonta semajno.

“Mi sentas, ke ambaŭ verkistoj skribas kun veraj sentoj. Sanmao emas priskribi pri raciaj pensoj, dum Chiung Yao emas pri amo. Ili komplementas unu la alian. La verkoj de Chiung Yao estas iom unuformaj, la intrigoj estas similaj, kaj ne tre subtilaj, la literatura valoro ne estas tre alta.”

“Mi ne atendis, ke vi estas sperta pri aprezado de literaturo. Mi pensis, ke medicinaj studentoj ne zorgas pri literaturo.” Pri ŝi mi ekhavis alian “ne atendis”.

“Medicinaj studentoj estas pli realemaj kaj trankvilaj, ili ne povas kuraci malsanulojn per fikcio. Sed mi ŝatas literaturon, kaj ankaŭ aliajn...”

“Ĉu vi ankaŭ ŝatas eksterlandan literaturon?”

“Jes.”

“Post du semajnoj mi prelegos pri Kant kaj la eŭropa romantika literaturo.”



“Ĉu Kant ne estas germana klasika filozofo?” Ŝi estis iom mirigita.

“Jes. Multaj rigardas Kant nur kiel filozofon, sed fakte lia filozofia penso, kune kun la filozofiaj pensoj de Schelling, Fichte kaj Hegel, havas grandan influon al la eŭropa romantika literaturo.”

“Ĉi tion mi ne sciis. Vi legis multe da libroj, ĉu vi elspezas vian salajron por aĉeti librojn? Vi havas tiom da libroj en via ĉambro. Kiam ajn mi pruntos de vi kelkajn librojn eldonitaj en la angla lingvo. Mi bezonas ekzercadon de anglaj legadoj.”

“Bone. Ĉu vi lernas la anglan por ekzameno de magistriĝo?” mi demandis ŝin scivoleme.

“Jes, kial mi ne provu?” ŝi diris iom memfide.

Elirinte la tunelon, ŝi adiaŭis min: “Bonvolu reiri. Dankon al vi. Ni morgaŭ renkontiĝu sur Junulara-placo. Ho, Instruistino Gen, mi havas demandon: kion signifas la insigno sur via brusto?”

Mi klarigis al ŝi, ke tio estas la verda stelo, simbolo de Esperanto. Oni nomas Esperanton la monda lingvo.

“Esperanto? Ĉu la angla ne estas la monda lingvo?”

“Ne, tute ne. Esperanto estas internacia helplingvo kreita de la pola okulkuracisto Zamenhof. Mi rakontos al vi pli detale poste.”



Ekde tiu semajno, ŝi venis ĉiun sabaton kaj eĉ prelegis pri «Analizoj de Songoj» de Freud. Ŝia scioj estis vere vastaj! Mi ĉiufoje akompanis ŝin ĝis la elirejo de la tunelo. Oni diras, ke kiam la tunelo estis ĵus konstruita, iu estis prirabita kaj mortigita en ĝi. Ŝi ne konis la onidiron.

Post komenciĝo de la movado kontraŭ ideologia liberaligo, iu el Buroo de Publika Sekureco afable avertis al ni, ke ni ĉesu la aktivecon de “Paca Legsalono”. Ni sekvis lian averto, ke “Paca Legsalono” venis al ĝia fino. Pro la malvarma vetero kaj ĝenoj de kelkaj petolemaj mezlernejoj, oni fermis “English Cornor”.

He Lei daŭre venis al mi, ne plu sabaton vespere sed dimanĉe posttagmeze. Ŝi petis min helpi ŝin je lernado de la angla, Ĉiufoje ŝi alportis plurajn paĝojn da ekzercoj por ke mi korektu ilin. Ŝi estis plena de energio kaj ankaŭ volis, ke mi instruu al ŝi Esperanton. Mirinde, en malpli ol monato ŝi povis sekvi mian meznivelan kurson de Esperanto en Sijana Kultura Palaco! Mi dubis, ĉu ŝi bone lernis sian medicinan fakon. Sed ŝi ricevis stipendion ĉiusemestre, eĉ la unuaklasan! Vastaj scioj, abunda energio, lerta cerbo – vere impona knabino! En malpli ol tri monatoj, ŝi povis flue legi mian longan artikolon en la jarkunveno de Sijana Esperanto-Asocio!

Tiel turniĝas la tergloba, tiel fluas la tempo.



aŭtorino, *Pearl S Buck*
(Usono)

Vento orienta – Vento okcidenta (4)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 001*



elangligis *Detlef Karthaus*
(Kanado)

ĈAPITRO 6

Kiel mi povas rakonti al vi pri mia peza koro, Fratinjo?

La tago de mia forveturo krepuskis grize kaj trankvile. Tio estis ĉe la fino de la deka luno, kiam la brunaj folioj komenciĝas silente ŝvebi al la tero, kaj la bambuoj tremas pro frosteto ĉe la matena kaj vespera krepuskoj. Mi promenis tra la korto, haltante en la lokoj kiujn mi longe amis por plifortigi la impreson en mia memoro pri ilia beleco. Mi staris apud la baseno kaj aŭskultis kiel la leĝera vento kraketigis la mortintajn guŝojn kaj foliojn de la lotusoj. Mi sidis dum horo sub la tuberplena junipero, kiu dum tricent jaroj staris en la rokĝardeno en la tria korto. Mi plukis branĉeton de unu el la belegaj bambuarboj en la korto apud la pordego, kaj ĝuis la brilajn skarlatajn berojn pendantajn inter la malhele verdaj folioj. Kaj tiam por memorigi min pri la beleco de la korto, mi elektis ok potojn da krizantemoj, kiujn mi kunportis kun mi. Ili estis tiam en perfekta formo kaj mi pensis, ke ilia koloro, ruĝa, ora kaj pale purpura helpus mildigi la malplenon de la domo. Tiel mi reiris al mia edzo.

Li ne estis hejme kiam mi eniris la etan halon. La servistino diris al mi, ke oni vokis lin per urĝa mesaĝo je la matena krepusko; ŝi ne sciis kien. Mi zorge metis la krizantemojn dise tra la saloneto meditante pri kiel plej bone lokigi ilin por surprizi lin. Sed kvankam mi faris al mi penon, mi seniluziiĝis. Se ili riĉe brilis en la malnova korto kontraŭ la nigraj skulptaĵoj de la pasejoj, ĉi tie, kontraŭ kalkitaj muroj kun flava farbo, la floroj febliĝis al artefarita beleteco.

Ho, kiel kun la floroj, tiel estis kun mi ankaŭ! Mi surmetis la jadvokolorajn satenajn pantalonon kaj mantelon kaj la nigran, veluran, senmanikan jakon. Mi dekoraciis mian hararon per jadaj kaj oniksaj ornamaĵoj kaj mi pendigis jadvon de miaj oreloj. Mi portis nigrajn ŝuojn el veluro, kiuj estis arte ellaboritaj kun etaj oraj bidoj. Mi lernis de La Mei, la Kvara Sinjorino en la domo de mia patrino, pri la allogo de senkoloraj vangoj kaj iom da karmine ruĝa farbo sur la malsupra lipo, kaj la sorĉkapablo de parfumitaj, rozecaj polmoj. Mi ne domaĝis penon por tiu unua vespero kun mia edzo. Mi vidis, ke mi estas bela.

Kiam mi estis vestita, mi sidadis atendante aŭdi liajn paŝojn sur la sojlo. Se mi povintus flankenpuŝi skarlatan kurtenon kaj aperi antaŭ li en la subtila lumo de malnova ĉina ĉambro, mi eble sukcesus. Sed ekvilibre malstabila, mi devis malsupreniri laŭ kraketanta ŝtuparo por alproksimiĝi al li en la salono. Sed nenio helpis min. Kiel la krizantemoj, mi estis nur beleta.

Mia edzo revenis hejmen malfrue kaj aspektis tre laca. Mia freŝeco nun estis jam for, kaj kvankam lia saluto estis sufiĉe afabla, liaj okuloj ne alkroĉiĝis al mi. Li nur petis, ke la servistino haste preparu la vespermanĝon, ĉar li estis okupita la tutan tagon pri malsanulo kaj ne manĝis ekde la mateno.

Ni manĝis en silento. Mi apenaŭ povis gluti pro stultaj larmoj, kaj li haste finis sian rizon kaj tiam sidis antaŭ sia teo, suspirante de tempo al tempo kaj sulkante la frunton. Fine li lace leviĝis kaj diris:

“Ni iru en la salonon.”

Ni sidiĝis kaj li supraĵe demandis pri miaj gepatroj. Li atentis miajn respondojn tiel malmulte, ke mi fariĝis hezitema pri mia klopodo interesi lin kaj mi finfine silentiĝis. Unue li apenaŭ notis, ke mi ĉesis paroli. Tiam li vigliĝis kaj pli afable diris:

“Bonvolu ne zorgi pro mia humoro. Mi estas vere kontenta ke vi revenis. Sed hodiaŭ dum la tuta tago mi batalis kontraŭ superstiĉo kaj absoluta stulteco, kaj mi perdis. Pri nenio alia mi povas pensi krom ke mi malsukcesis. Mi daŭre demandas min, ĉu mi faris ĉion eblan? Ĉu ekzistas argumento, kiun mi ne prezentis por savi tiun vivon? Sed mi opinias, fakte mi certas, ke mi faris ĉion eblan, tamen mi perdis!

“Ĉu vi memoras la familion Yu apud la Tambura Turo? Ilia Dua Sinjorino provis mortigi sin per pendumado! Ŝi ŝajne ne plu povis toleri la viperan langon de sia bopatrino. Ili vokis min, kaj mi substrekas ke mi estus povinta savi ŝin! Ŝi ĵus striktigis la ŝnuron kiam ili trovis ŝin! Mi tuj preparis la kuracilojn. Tiam eniris la maljuniĝinta onklo, kiu estas vinkomercisto. La maljuna s-ro Yu, vi memoras, estas mortinta kaj nun la vinkomercisto estas la familiestro. Li envenis brue kaj kolere kaj tuj postulis, ke oni uzu la oldajn metodojn. Li venigis la pastrojn, kiuj frapis la gongojn por revoki la animon de la virino, kaj ŝiaj parencoj kunvenis kaj metis la kompatindan senkonscian knabinon – ŝi ankoraŭ ne havas 20 jarojn – sur la plankon en genuanta pozicio; tiam ili intence ŝtopis ŝiajn nazojn kaj buŝon per katuno kaj ŝtofo kaj vindis vestaĵojn ĉirkaŭ ŝia vizaĝo!”

“Sed, sed” mi diris, “tio estas la tradicio, tion ni ĉiam faras tiel. Ĉar vi komprenas, ke multo de la spirito jam eskapis kaj oni devas reteni la ceteron per ŝtopado de la aperturoj.”

Li komencis marŝadi tra la ĉambro tien kaj reen pro eksciteco. Nun li haltis antaŭ mi, kun kunpremitaj lipoj. Mi povis aŭdi lian rapidan spiron. Li fakte furioze regardis min.

“Kion!” li kriis, “Vi, ankaŭ?”

Mi kuntiriĝis pro timo.

“Ĉu ŝi mortis?” mi flustris.

“Mortis? Ĉu vi mortus se mi farus ĉi tion sufiĉe longe?” Kaj li ekprenis miajn manojn per unu de siaj kaj malmilde metis poŝtukon super miajn buŝon kaj nazon. Mi tordiĝante liberiĝis kaj forŝiris ĝin. Li ekridis raŭke kiel la bojado de hundo kaj sidiĝis kaŝante la kapon en la manoj, kaj nia silento estis premiga kiel fizika doloro. Li neniam notis la krizantemojn, kiujn mi tiel zorge aranĝis tra la ĉambro.

Mi rigardis lin konfuzita kaj iom timigita. Ĉu povus esti ke li fakte pravas?

Tiun vesperon, kun trista koro, mi metis la jadajn ornamaĵojn en iliajn arĝentajn ujojn kaj formetis la satenajn vestaĵojn. Mi iom post iom konsciis, ke oni instruis min malĝuste. Mia edzo ne estis unu el tiuj viroj al kiu virino plaĉas nur prosensallogo, kiel parfumita floro aŭ pipoplano de opio. Ne sufiĉis la eleganta beleco de la korpo. Mi devas studi por alimaniere plaĉi al li. Mi memoras mian patrinon kun la vizaĝo kontraŭ la muro kaj kun laca voĉo dirante:

“La tempo ŝanĝiĝis.”

Tamen mi ne povis decidiĝi malbindi miajn piedojn. Verdire estis s-ino Liu kiu helpis min. Ŝi estis la edzino de instruisto en la nova fremdlanda lernejo. Mi aŭdis mian edzon paroli pri s-ro Liu, kiel pri amiko. Ŝi sendis mesaĝon la tagon post mia reveno dirante, ke se plaĉas al mi, ŝi vizitos min la sekvantan tagon.

Mi faris grandajn preparojn, ĉar ŝi estis mia unua vizitanto. Mi ordonis al la servistino aĉeti ses specojn da kuko aldone al akvomelon-semoj kaj sezambiskvitoj kaj la plej bonan teon de la marko *Antaŭ La Pluvo*. Mi vestis min per mia abrikotkolora sateno kaj metis perlojn en la orelojn. Sekrete mi hontis pri la domo. Mi timis, ke ŝi trovas ĝin hida kaj dubus pri mia gusto, kaj mi esperis ke mia edzo ne estus hejme, tiel ke mi povus almenaŭ loki la seĝojn kaj tablon pli formale kaj tiel klare indiki kiu estas la honorloko.

Sed ĉi tiun fojon li ne eliris. Li sidis legante kaj ekridardis kun rideto kiam mi iom nerveze eniris la ĉambron. Mi planis esti sidanta je la alveno de la gasto, kaj dum la servistino enirigus ŝin, mi leviĝus kaj riverence indikus la plej bonan seĝon. Sed kun la ĉeesto de mia edzo mi ne havis okazon aranĝi la ĉambron, kaj kiam tintis la sonorilo, mia edzo mem iris al la pordo. Tio pleje ĉagrenis min kaj mi tordis la manojn kaj ne sciis kion fari. Tiam mi aŭdis gajan voĉon kaj mi ne povis rezisti rigardi en la halon. Mi vidis strangaĵon. Mi edzo prenis la manon de la gasto kaj skuis ĝin supren kaj malsupren en tre stranga maniero. Tio tre mirigis min.

Subite ĉesis kaj mia miro kaj ĉiuj pensoj pri la gasto, ĉar mi rigardis lian vizaĝon. Ho mia edzo, via vizaĝo neniam tiel rigardis min, vian edzinon! Estis kvazaŭ li finfine estus trovinta amikon.

Ho Fratinjo, se vi estus tie vi povus instrui min kion fari! Sed mi estis sola. Mi ne havis amikojn. Mi povis nur cerbumi kaj turmentiĝi kaj demandi min, kion al mi mankis por plaĉi al li.

Kaj dum ŝia ĉeesto mi ekzamenis mian gaston de proksime por vidi ĉu ŝi belas. Sed ŝi ne estis bela, eĉ ne beleta. Ŝia vizaĝo estis granda kaj ruĝa kaj bonhumora, kaj kvankam ŝiaj okuloj brilis afable kvazaŭ ridetoj, ili estis rondaj kaj helaj kiel vitroperloj. Ŝi portis mantelon el simpla griza ŝtofo super nigra, senflora, silka jupo, kaj ŝiaj piedvestoj similis al viraj. Tamen ŝia voĉo estis agrabla, kaj ŝia parolo rapida kaj volonta, kaj ŝia ridado estis varma kaj senkaŝa. Ŝi parolis multe kun mia edzo, kaj mi sidis kaj aŭskultis kun pendanta kapo. Ili diskutis aferojn pri kiuj mi neniam aŭdis. Fremdaj vortoj flugis tien kaj reen. Mi komprenis nenion krom la plezuro sur la vizaĝo de mia edzo. Tiun vesperon mi sidis silente kun mia edzo post la vespermanĝo. Mi daŭre memoris la rigardon sur lia vizaĝo dum la vizito. Mi neniam antaŭe vidis tian esprimon avidan kaj leĝeran. Li estis plena je vortoj por ŝi kaj li elŝutis ilin dum li staris antaŭ ŝi. Li restis en la ĉambro tra la tuta vizito, kvazaŭ ŝi estus viro. Mi leviĝis kaj iris al lia flanko.

“Jes? li demandis, levante la okulojn el sia libro.

“Rakontu al mi pri la virino, kiu vizitis hodiaŭ”, mi petis.

Li kliniĝis malantaŭen en sia seĝo kaj rigardis min penseme.

“Kio pri ŝi? Ŝi estas diplomito de granda Okcidenta altlernejo por virinoj nomita Vassar. Ŝi estas inteligenta kaj interesa, kiel oni preferas virinojn. Krome, ŝi edukas tri imponajn knabojn inteligentajn, purajn, bone flegitajn. Vidi ilin feliĉigas mian koron.”

Ho, mi malamas ŝin, mi malamas ŝin. Ho kion mi povas fari? Ĉu ekzistas nur unu vojo al lia koro? Ŝi tute ne estas bela.

“Ĉu vi opinias ŝin bela?” mi flustris.

“Nu, certe jes”, li emfaze respondis. “Ŝi estas sana, prudenta kaj marŝas sur solidaj, stabilaj piedoj.

Li rigardis en la malplenon. Mi anxie cerbumis dum kelkaj minutoj. Restis nur unu vojo por virinoj. Kiel mi povas fari tion?...tamen la vortoj de mia patrino estis, “Vi devas plaĉi al via edzo.”

Mia edzo sidis kaj penseme fiksrigardis trans la ĉambron. Mi ne sciis, kion li pensis. Sed mi sciis ĉi tion; kvankam mi portis persikokoloran satenon kaj portis perlojn en la oreloj, kvankam mia hararo estis glata kaj nigra kaj brila en lerte aranĝitaj spiraloj, kvankam mi staris flanke de lia ŝultro, tiel proksime, ke per eta movo de lia korpo lia mano tuŝus la mian, tamen li ne pensis pri mi.



Tiam mi mallevis la kapon kaj donis min en liajn manojn. Mi malagnoskis mian pasintecon dirante:

“Se vi diros al mi kiel, mi malbindos miajn piedojn.”

Kiam mi nun konsideras la pasintecon, mi konscias ke mia edzo ekinteresiĝis pri mi tiun vesperon. Ŝajnis ke antaŭe ni havis nenion pridiskutendan. Niaj pensoj neniam renkontiĝis; mi povis nur observi lin, miri kaj ne kompreni, kaj li neniam rigardis min. Nia interparolado okazis kun la ĝentileco de fremduloj; Mi estis sinĝena antaŭ li, kaj lia sinteno estis de zorga ĝentileco, kiu preterrigardis min. Sed nun kiam mi bezonis lin, li finfine vidis min, kaj kiam li parolis li pridemandis min kaj interesiĝis pri mia respondo. Miaflanke, la amo kiu estis tremanta en mia koro firmiĝis al adorado en tiu momento. Mi neniam imagis ke viro povus trakti virinon tiel humile kaj molkore. (*daŭrigota*)



Aŭtoro: *Maksim Bočkarev*
(Rusio)

Jaga (4)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 001*



elrusigis *Sergei Isakov*
(Rusio)

Geedziĝo, sed ne venĝo

La leganto verŝajne volas demandi min: kio okazis al Beljana? Mi konsentas, ni devas paroli pri tio. Ĉar ŝia rakonto ankoraŭ ne finiĝis.

Beljana rekonsciiĝis jam hejme. Ŝi ne sciis kiom longe ŝi estis en forgeso. Tuj kiam ŝi povis paroli, ŝi tuj vokis al si sian maljunan parencon Stav. Kaj li rakontis al ŝi ĉion, kion li atestis en la maldensejo en la Sonora Arbaro. Antaŭ tio, li ne parolis pri tio kun neniuj, kaj li ankaŭ strikte ordonis al tiuj militistoj, kiuj pluvivis kun li en la terura batalo kun la solduloj de Sur, forgesi pri tio.

La maljuna Stav longe kaj detale rakontis ĉion, kio okazis al ili kaj Bajana ekde la sama momento, kiam la kuriero Volĉok alrajdis (kun kiu Beljana poste ankaŭ havis longan kaj detalan interparolon). Kaj kiam li finis sian rakonton per la vortoj, ke Bajana iris en la densejon kune kun la nigrabarba sorĉisto, la maljuna militisto estis preta plori, kiel tie, en la senarbejo. Estis kvazaŭ li denove spertis disiĝon de sia amata nevino.

Li estis tre surprizita de la reago de Beljana. Li atendis, ke ŝi estu nekonsolebla, kiel konvenas al amanta patrino, kiu perdis sian filinon. Sed Beljana estis tute trankvila. Post kiam Stav finis sian rakonton, ŝi longe silentis, kaj la maljuna militisto ne kuraĝis interrompi la silenton de ŝiaj pensoj.

Fine ŝi diris: "Tiel estu. Jagg avertis, ke tio povus okazi. Do ĝi estas destinita!"

Kaj, kvazaŭ forgesinte pri sia filino, ŝi daŭrigis: "Kion pri la taĉmento de Bujan?"

La maljuna militisto estis tre surprizita de tia subita transiro, sed ne montris. Li rakontis al ŝi la tutan malĝojan historion de Bujan kaj lia taĉmento. Kaj ke ĉiuj, kiuj pluvivis el niaj najbaroj, kolektas fortojn kaj petas helpon de aliaj klanoj por venĝi pro la perfido.

La novaĵoj estis unu "pli amuza" ol la alia. Kaj en Beljana ekparolis la sango de ŝiaj prapatroj denove: „Sendu kurieron al la najbaroj! Li diru, ke tuj kiam mi povos ekiri, mi alvenos al ili kun eta taĉmento. Kaj ili lasu min diri al ili, aŭ mortigu min kaj per tio ricevu indan monpunon por iliaj mortintoj”.

Stav ne obĵetis. Li aŭdis Beljana diri ĉi tiujn vortojn. Pri ili estis neniu dubo. Estis voko al ago kaj ili donis esperon.

Li iomete riverencis kaj marŝis al la pordo. Sed li ne povis ne demandi: "Sinjorino, eble ni povas sendi iun por serĉi Bajanan?"

"Ne! Iru! Faru tion, kion vi devas fari!" "Beljana akre respondis kaj fermis la okulojn, klarigante, ke la konversacio finiĝis. Stav iris kaj pensis pri kiu sendi al la najbaroj. Por la sendito estis preskaŭ certa morto. Ĉio dependis de kiel li povis transdoni la vortojn de Beljana. Kaj kvazaŭ magie, Volĉok aperis antaŭ li. La kuriero estis turmentita de multaj demandoj pri la sorto de Bajana, sed tamen ne kuraĝis alproksimiĝi al maljuna Stav. Kaj tiel, kuraĝiĝante, li ekmarŝis al li.

Volĉok ne sukcesis eĉ malfermi la buŝon, kiam li ricevis la taskon. Klariginte ĉion detale al la juna sendito, Stav plurfoje emfazis, ke ĉu Volĉok revenos aŭ ne dependas nur de li mem. Kiel li prezentas la vortojn de sia mastrino, tia estos lia sorto.

Vidante, ke la mesaĝisto estas decidita komenci konversacion pri Bajana, la maljuna militisto decidis trompi kaj denove, ne permesante al Volĉok malfermi sian buŝon, diris: "Revenu, ni parolu pri Bajana!"

Volĉok ŝajnis esti ricevinta ŝargon. Senhezite, li kuris al la stalo, prenis ĉevalon kaj ekiris. La mortiga tasko fariĝis io intera por li. Gravas por li lia reveno, kaj li hastis.

Atinginte la najbaran tribon, Volĉok komprenis, ke Stav iom troigis aferojn. Najbaroj suferis gravajn damaĝojn. Ili ne atendis atakon de amika tribo kaj estis atingitaj subite. Ili perdis multajn el siaj plej bonaj militistoj en tiu freneza batalo. Kaj aliaj triboj ne hastis engaĝiĝi en la milito. Ĉar ili simple ne kredis, ke tia sovaĝeco eĉ eblas!

Rebatante la frenezan atakon de Bujan, preskaŭ ĉiuj aĝestroj en la najbara tribo estis mortigitaj. Kaj kiam Volĉok alkuris al ili, la plej aĝa filo de la forpasinta komandanto Dogad parolis kun li. Li atente aŭskultis la senditon kaj diris al li, ke li atendu lian respondon.

Dogad diferencis de la militistoj de sia tribo en inteligenteco kaj kompreno, kaj lia nomo konvenis al li tre bone. Li tute bone komprenis, ke estas iom da konfuzo en tio, kio okazis. Kaj la rapideco kun kiu la atakanta flanko sendis la mesaĝiston estis konfirmo de tio. Dogad bonege legis en la mensoj de homoj pri kio ili silentis, kaj vidis, ke la sendito ne mensogas.

Post iom da pripensado, Dogad decidis akcepti la oferton.

“Ripozu. Oni donos al vi la plej bonan ĉevalon, kaj vi revenos. Diru: ni estas pretaj paroli!” - Dogad diris tre trankvile. La sendito, kiel oni diras, elspiris.

Volĉok estis preta ekiri sen ripozo, sed ne kontraŭis. La sorto estas kaprica birdo. Nur la malĝusta movo kaj ĝi forflugos por ĉiam.

Matene oni donis al li bonan ĉevalon, provizojn kaj sendis sian vojon. Volĉok hastis. Li volis ekscii, kio okazis al Bajana. La maljuna vojevodo promesis diri ion al li, kaj ĉi tiu penso donis forton al la sendito.

Reveninte, Volĉok tuj iris serĉi maljunan Stavon.

“Mi faris ĉion kiel dirite! Ili konsentas! - ĝoje elparolis la sendito. Kaj li frostiĝis, atendente la promesitan rakonton.

Stav perfekte komprenis, kion la sendito atendas.

“Ĉio, kion mi povas diri al vi, estas forgesu pri Bajana! Mi komprenas, ke vi atendas, ke mi rakontos al vi pri ŝia sorto. Sed mi diris ĉion, kion mi povas diri! Tiel devus esti! Kaj vi silentu, kion vi vidis, kion vi aŭdis kaj kion vi divenas, silentu!” - Stav severe ĉesigis ĉi tiun temon. Sed pensinte dum sekundo, memorante kiel Volĉok riskis por Bajana, li aldonis: "Tiel devus esti, filo!" Li frapetis la senditon sur la ŝultron kaj iris kun raporto al Beljana.

Beljana tre rapide resaniĝis. Dum la sendito estis survoje, ŝi komencis leviĝi. Estis al ŝi ankoraŭ malfacile marŝi pro ŝiaj vundoj, sed ŝi jam povis sidi. La herbisto, kiu trovis tiun mirindan herbon, estis ege favorata kaj akiris konsiderindan aŭtoritaton inter siaj kolegoj en la fako.

Atente aŭskultinte la raporton de la maljuna vojevodo, ŝi diris: “Tiel estu! Ni ekiru la vojon laŭ la unua neĝo!”

Aŭtuno kaj vintro estis fruaj en tiu jaro. La neĝo falis kaj ili devis prepariĝi por iri. Beljana plenumis sian vorton kaj ekiris kun eta taĉmento. Kiu inkludis dek du el ŝiaj proksimuloj kaj Rat kun Stav. La maljuna militisto sentis sin kulpa antaŭ Beljana kaj decidis, ke en okazo de ekstrema bezono li metos sian vivon kun ŝi, sed pli bone, kompreneble, por ŝi. Tio estis la arma kutimo de tiuj jaroj.

Survoje nenio okazis al ili, kio povus esti priparolata detale.

Ne atendente varman bonvenigon, ili ege miris pri kiel ili estis salutitaj. Dogad surprizis ŝin.

Post ĉiuj ceremonioj kaj ritoj, kvar restis en la gastoĉambro. Dogad kun sia najbaro kaj Beljana kun Stav. Beljana rakontis la tutan historion, ekde la momento kiam ili ricevis novaĵon pri la atako kontraŭ siaj vilaĝoj. Ĉio estas justa. Ŝi rakontis Dogad de komenco ĝis fino, transsaltante tiujn momentojn kiuj koncernis Bajanan. Kiam Dogad demandis kio okazis al la heredantino, Beliana mensogis unuafoje en ilia tuta konversacio. Ŝi diris ke Bajana malaperis kune kun ŝia taĉmento kiam ŝi iris al ŝia savo.

Dogad aŭskultis ĉion tre atente. Kiel mi diris antaŭe, li povis facile legi la mensojn de homoj. Tio, kion Beljana diris, ne vekis en li suspekton. Li nur rimarkis, kiel la maljuna militisto, kiu estis kun Beljana, premis la finon de sia zono. Dogad atribuis tion al la amo de la maljunulo al Bajana. Ĉiuj najbaraj kaj malproksimaj triboj sciis kiom multe iliaj parencoj amis la filinon de la tribestro.



Kiel signo de repaciĝo, Dogad invitis Beljanan por resti kun ili dum pluraj tagoj, kaj ŝi ĝoje konsentis. La risorto, kiu estis kunpremita en ŝi dum la tutaj jaroj de atendado de ŝia amata Jagg krevis post la rakonto de Stav. Komence estis malpleno en ŝia animo, sed resaniĝante el siaj vundoj, ŝi havis tempon por pensi. Kaj ŝi povis konfesi al si, ke ŝi antaŭ longe adiaŭis Jagg-on, kaj verŝajne atendis lin pro kutimo.

Kaj ĉi tiu Dogad sukcesis impresi ŝin. Li kombinis la forton de militisto kaj inteligentecon. Kompreneble, estis multaj inteligentaj viroj en ŝia tribo, sed neniu el ili povis fanfaroni pri tia penetra rigardo. Ŝajnis al ŝi, ke li rigardas rekte en ŝian animon kaj komprenas ĉion pri ŝi, do ŝi konsentis resti kun ĝojo. Ŝi certe sciis, ke ĉi tiu militisto-saĝulo povos helpi ŝin travivi la amarecon de disiĝo de sia filino kaj la doloron de perdoj en la sensenca masakro, farita de Bujan.



La venontan tagon Dogad kaj Beloana promenis kune. Kaj ankaŭ la sekvan tagon. La maljuna Stav rigardis sian parencinon, kaj lia animo ĝojis. Beljana floris antaŭ liaj okuloj. “Vi ne scias kie vi trovos kaj kie vi perdos,” pensis la grizhara militisto, rigardante Beljanan.

Kompreneble, Beljana ne forgesis pri sia filino. Kompreneble, ŝi ploris nokte. Sed ŝi sentis sin pli bone kiam Dogad estis proksime. Li nenion alian demandis, li komprenis ĉion. Li ne bezonis paroli. Li sciis silenti tiel, ke multaj ne povas paroli.

Beljana revenis hejmen monaton poste. Kaj la sekvan tagon ŝi anoncis, ke ili nun estos pli proksime ligitaj kun la tribo de siaj najbaroj ol nur najbaroj. Beljana sciis ke la magiistoj estos kontraŭ, ĉar ŝi estis la vidvino de Bujan, ŝia laŭleĝa edzo, kaj Dogad estis vidvo. Sed estas bone, ili iel venos al interkonsento. Ekzistis neniu rekta malpermeso de reedziĝo kiel tiela. Sed oni kredis, ke tio estas malbona signo por kaj edzo kaj edzino. Kaj Beljana parolis kun la saĝuloj kaj konvinkis ilin ke ŝia reedziniĝo alportos grandan profiton al ambaŭ triboj. Kaj por plifortigi siajn vortojn, ŝi donis al la Magiistoj insulon ĉe la Granda Rivero, kie eĉ ŝi ne povus piedpaŝi sen ilia permeso. Krome, ŝi promesis virojn kaj lignon kaj blankan ŝtonon konstrui novan templon. Pri tio ili decidis.

Kaj en la aŭtuno de la venonta jaro, Bajana havis pli junan fratinton, Sijana. Pri kio la filino de Jagg ekscios multe pli poste. (*daŭrigota*)

Interjuvo kun Lilaketo

Erika Godo

Ŝton'

Ŝton' en naturo,
la pasinton, futuron
eterne montras...

/Lilaketo. 03.07.2025/
(Haiku al tiu ŝtona bildo)



Lilaketo

Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?

Unue mia patro, Johano, instigis min al literaturo, kiam mi estis nur 5-6 jara. Poste mia mezlerneja instruistino pri literaturo, Viola, sed mi pli multon povas danki al Imre Szabó [Imre Sabo], fama hungara esperantisto, kiun mi ekkonis en 2000. Li estis unu el miaj ekzamenatoj dum ŝtatekzameno pri Esperanto.

Mia patro estis tre simpla viro, vivante en la socialismo. Li laboris en brik-fabriko, sed tre ŝatis la librojn kaj muzikon. Mi estis vizitanta infanĝardenon, kaj jam tiam li instruis min skribi, kalkuli eĉ paroleti la anglan. Estas interese: Li ne sciis paroli la anglan..., sed ĉiutage li kun la amikoj aŭskultis "okcidentan" muzikon, ĉefe Beatles-kantojn pere de malnova Sokol-radio.

Kaj ĉiuvespere li rakontis al ni (mi havas pli junan fraton) fabelojn, poemojn. Ni vivis malriĉe, do, ni havis malmulte da libroj, pro tio en iu somera tago li kunportis min en la lokan bibliotekon. La ino estis ege surprizita, kiam la 6jara infanĝardenino bele skribis sian nomon, aĝon, adreson sur la enskriban dokumenton. La biblioteko iĝis mia dua hejmo! (Post 16 jaroj mi iĝis bibliotekisto.)

Kiam vi verkis vian unuan verkadon?

Unue mi interesiĝis pri prozo kaj romanoj... Mi , kiel juna infano, ege ŝatis/-as romanojn de Jenő Rejtő kaj Endre László. Sed -kompreneble mi ŝatis ankaŭ la amromanojn... Mia unua novelo, skribite antaŭ 40 jaroj temis pri gejunuloj kiuj renkontiĝis ĉe sketejo, kaj dum lernado de glacidancado ili ekamis unu la alian...Poste mi verkis krimrakontojn - sed mi ne havis tian talenton, kiam havis Sro Rejtő...., mi pensis, ke mi ne povas iĝi vera krimrakonto-verkisto :) Sed mia instruistino pri literaturo, anjo Viola instigis, kuraĝigis min verki poemojn. Ŝi multe helpis min profesie, mi ege ĝuis ŝian instruadon. (Ankaŭ ŝi mem estis verkistino, kiam ŝi iĝis pensiulo, multe da belegajn poemojn verkis - hungarlingve.

Hungarlingve mi verkis poemojn dum miaj gimnaziaj jaroj, esperantlingve, post kiam mi ekkonis Emerikon. [Imre Szabó]

Kio estas la fonto de via inspiro por verki poezion kaj hajkojn?

Inspiro.... tio estas interesa demando. :) Min povas inspiri ĉefe miaj sentoj.... Mi ekvidas iun belan floron aŭ akvoguton sur florfolio...

Hajkoj estas tre interesaj, ĉar " normale" vi povas (preskaŭ) libere skribi la poemojn, ĉu ne? Sed hajko estas tradicia japana poeziaĵo konsistanta el unu vertikala 17-silaba linio, enhavanta 3 fonetikajn partojn de 5, 7, 5 silaboj. Kompreneble en Esperanto hajkoj aperas en 3 horizontalaj linioj de 5, 7, 5 silaboj. Estas grave, ke oni devas uzi min.unu vorton pri la naturo. Hajkoj ofte invitas la legantojn al meditado.

Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?

Specialajn temojn mi ne havas.... sed ofte mi verkas pri sentoj kaj la naturo.

Kiu estas la esperantista verkisto aŭ poeto, kiu havis la plej grandan influon sur vin?

Esperantista verkisto.... Dum mia Esperanta vojo ekde 2000 unue ĉefe mi legis tradukitajn novelojn, poemojn. Denove mi povis legi poeziaĵojn de miaj ŝatataj (hungaraj) verkistoj, poetoj, ekz. Jenő Rejtő, János Arany, Sándor Petőfi aŭ Attila József.

Mi estas ege dankema al la sorto, ke mi renkontiĝis kun Emeriko Szabó. Li , kiel ege talenta tradukisto kaj poeto helpis kaj instigis min verki poemojn en Esperanto.

Kio estas la plej grava afero en la vivo por vi?

La plej grava afero en la vivo por mi nun [estas grave: nun] la libero. Dum sia vivo la homo havas diversajn epokojn..., kompreneble estis grava por mi alia afero, kiam mi estis 15 -25....aŭ nun , kiel 55jara virino.

Nun gravas por mi la libero, kaj tio, ke mi povas vivi MIAN vivon - sola mi vivas, sed ne soleca..., malproksime de mia amata lando, Hungario, sed mi sentas min hejme ankaŭ ĉi tie, en Vjetnamio...

Ĉu vi partoprenis literaturajn konkursojn kaj gajnis premion iam?

Jes. La unuan (kaj lastan) fojon mi partoprenis literaturan konkurson en 2022. Mi verkis eseon (por gajni vojon al E-kongreso en Montrealo.)

Mi gajnis . Sed tamen mi ne povis vojaĝi, ĉar bedaŭrinde ili apogis nur la restadon en Montrealo. La flugbileton ne. Do, mi ne povis aĉeti la bileton....

Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?

Estontaj planoj.... mi ne havas konkretajn planojn... tute hazarde mi verkas poemojn depende de mia mensstato...

Kion vi volus diri al legantoj de Literatura Vivo?

Karaj Legantoj.... simple : legu, legu, legu.... ;)

Juliana Vas-Szegedi (Hungario)

"Mi naskiĝis la 18-an de septembro, 1969, en urbo Tiszafüred, urbeto situanta en Orient-Hungario, apud la belega rivero Tibisko. Mi havas tri gefilojn.

Mia hobia estis kaj estas la lingvolernado. Unue mi eklernis la rusan lingvon, poste la anglan, la germanan kaj Esperanton. Mi ekkonatiĝis kun la internacia lingvo, Esperanto, dum mia infanaĝo, sed serioze mi lernas ĝin ekde 2000. Mi ne nur lernis Esperanton, sed mi enamiĝis en tion. De tempo al tempo mi volas pli kaj pli multe lerni pri Esperanto, pri ĝia historio, literaturo, movado... Min interesas (krom poezio) la projektoj, celantaj enkonduki Esperanton, kiel unuan fremdan lingvon en la bazlernejoj. Mi deziras iĝi pli bona instruisto pri Esperanto, pro tio nun mi aniĝis al kurso de Instruista Trejnado, en urbo Poznan, Pollando, kie de eminentaj pedagogoj, elstaraj esperantistoj mi havos eblecon lerni.

Mi aktive provas partopreni Esperantan movadon, mi estas ano de „Amikeco” Esperanto-Asocio, Szolnok kaj REA – Regionala Fondaĵo por Kunagado, Tiszafüred, krom aneco de Hungaria Esperanto Asocio. Mi bedaŭras nur tion, ke pro tiu „simpla” kazo, „la mono” mi ne povas veturi al pli da Esperantaj eventoj, aranĝaĵoj –ĉefe al eksterlando. Sed en mia lando mi klopodas partopreni tiujn, eĉ organizi, ekzemple en 2007 mi entuziasme organizis dusemajnan renkontiĝon por Esperantistaj familioj, havantaj flue Esperanton parolantajn gefilojn.

Mi tradukis artikolojn por Esperantaj gazetoj (ekz. IPR, Naturista Vivo) kaj ĉiam feliĉe legas E-ĵurnalojn, gazetojn pro havi aktualajn informojn pri Esperantujo.

En 2008 naskiĝis mia tria infano, Mateo, kaj mi restis hejme 3 jarojn - dum tiu tempo mi regule komencis okupiĝi pri sporto. Unue mi komencis kuradi, ĉar volis liberigi mian korpon de kelkaj kilogramoj [-15kg], kaj mi revenis al mia karateklubo (mi komencis karatei en 1988, sed pro miaj gravedoj mi finis la aktivan sporton en 1992).

Mi ekhavis mian duan diplomon, kiel socialpedagogo en 2009. (Mia unua fako estis bibliotekisto). Poste mi akiris mian trian diplomon, mi iĝis oficiala sporttrejnistoj, karate-instruktoro kaj sportmasaĝisto.


Mia vivo post 2012 tute ŝanĝiĝis..., estis bonaj kaj malbonaj periodoj, divorco kaj sportsukcesoj... Mi ĉiam povis vivi feliĉe, sed la veran feliĉon mi trovis en 2018, kiam mi veturis al Vjetnamio, Hanojo por instrui karateon.

Nun mi vivas ĉi tie (kompreneble foj-foje mi vizitas miajn gefilojn, parencojn, geamikojn en Hungario) kaj ĝuas la miraklan, silentan kaj feliĉan vivon en mia dua hejmlando, kie mi povas okupiĝi pri la du plej gravaj fakoj en mia vivo: instruado de Kyokushin karateo kaj Esperanto.

Mi estas dankema al sro Zamenhof, kiel miloj kaj miloj en la mondo..., Esperanto donis al mi verajn geamikojn kaj dum la lastaj 25 jaroj mi spertis la miraklojn de Esperanto - kaj en Hungario, kaj en Vjetnamio."

Timoj kaj ĝojoj de mia esperanta parolado

(Majstro Franĉesko: Lumo kaj Varmo sur la Ponto
de Esperanto)




Viktorio

La nokta ekrano subite ekbrilis, montrante la modestajn vizaĝojn de kelkaj ĉinaj lernantoj. Dume, la tagmeza suno de Italio malavare trapenetris tra la kamerao de majstro Franĉesko. Lia tipa rideto disfloris kiel varma sunradio, kaj la sonora "Saluton!" tuj rompis la silenton de la virtuala spaco kaj la unuan glacieron de konatiĝo. En ĉi tiu magia reta klaso, malproksima gvidisto per sia unika ĉarmo kviete ekbruligis por ni la stelan vojon de Esperanto-komunikado.

Unuaj paŝoj en la retkurson, ni estis kiel timemaj cervetoj, erarvagintaj en strangan landon. La kamerao ŝajnis abismo, kiu batigis niajn korojn, kaj la mikrofonoj fariĝis kvazaŭ mutaj sigeloj — ni timis, ke niaj mallertaj prononcoj altiros silentan juĝon. Sed la profundaj kaj mildaj okuloj de Franĉesko trapenetris la ekranon, kvazaŭ li divenus nian heziton. Li neniam urĝis, sed nur ridetis, farante ekspresajn italajn gestojn, kaj pacience atendis la unuajn sonĝermojn de niaj voĉoj.

Antaŭ ĉiu leciono, li amike babetis, instigante nin dividi ĉiutagajn spertojn. Eĉ se ni diris nur kelkajn vortojn, li aŭskultis kun sincera intereso, kaj ofte laŭdis nin. Tiuj ŝajne "senrilataj" konversacioj fariĝis kvazaŭ mola ŝtupetaro, kiun li lerte teksis, por gvidi nin supren sur la krutan vojon al parolkuraĝo.



La humuro de Franĉesko estis kiel neniam estingiĝantaj stelaj lumoj en la klasĉambro. Dum klarigado de sekaj gramatikaj reguloj, li ĉiam pacience gvidis nin en la lingvoscenon. Kiam iu lernanto kuraĝe provis, li tuj aplaŭdadis per ridoj --"Bone! Bone!" estis lia kutima esprimo, kiu donis al ni centoblan kuraĝon. Eĉ eraroj fariĝis amuzaj epizodoj indaj je rideto. Liaj ridoj estis infekte gajaj, kaj la klasa etoso varmiĝis ĉiutage sub la katalizo de tiuj ridoj, kiel printempa glacio degelanta.

Malmulte post malmulte, nevideblaj baroj fandis en ridoj kaj sincereco. Ni jam ne hezitis malfermi niajn mikrofonojn; kvankam la voĉoj foje tremis, ni jam kuraĝis elparoli. Ĉiu brilo en la okuloj de Franĉesko, kaŭzita de nia progreso, fariĝis la plej valora rekompenco. Tiu momento de aprobo trakuris nin kiel elektra fluo — jen kiom rave sentiĝas la libera parolado! La klaso iĝadis bruema, sinsekvaj respondoj kaj gajaj diskutoj interplektiĝis. La virtuala lernĉambro fine pleniĝis per vigla spiro de lingvo fluanta libere.

Jam mallaŭte aŭdiĝis en la distanco la sonorilsonoj anoncantaj kursfinon. Rigardante la familieran rideton de Franĉesko sur la ekrano, kaj pensante pri la stela fajrero de Esperanto—kiun li mem ekbruligis kaj kiu apartenis al ni—baldaŭ devos provizore vivi sen lia gardo, forta nostalgio kviete inundiĝis en niaj koroj. Li estas ne nur instruisto: li estas la plej lumplena lumturo en nia Esperanto-vojaĝo, la gvidisto tra la nebulo de timo, kaj kara amiko kun kiu ni dividas sennombrajn ĝojajn kaj progresajn momentojn. Kvankam la kurso havas finĉapitron, la lingva fenestro al pli vasta mondo, kiun Franĉesko malfermis por ni, kaj la kuraĝo paroli kun varma ĝojo komunikiĝi — semita de liaj manoj en niajn korojn—jam por ĉiam enradikiĝis, neniam velkos.

Iam ni vagadis sur lingva insulo, sed majstro Franĉesko per sia pacienco kiel boato kaj sia humuro kiel velo helpis nin transnavigi la timigan mutan maron. Li instruis al ni, ke la vera magio de lingvo ne kuŝas en perfektaj silaboj, sed en la kuraĝo konektiĝi kaj la sincereco transdoni koron. Eble la klaslampoj baldaŭ mallumiĝos, tamen nia vekita voĉo—portante lian benon kaj signon—daŭre serĉos resonon sur la eĥomuro de la mondo, eligante propran sonon klaran kaj firman!



La 15-a literatura konkurso Esperanto

Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko kaj Bjalistoka Esperanto-Societo invitas vin partopreni en la 15-a literatura konkurso Esperanto ligas homojn por rakonto pri la temo Perditaj en la reto.

La konkurso celas junulojn pli ol 15 jarojn aĝajn kaj plenkreskulojn. Ĝiaj celoj estas: diskonigi la ideojn de Esperanto kaj la lingvon kreitan de bjalistokano L.L. Zamenhof kiel universala, supernacia rimedo de interkompreniĝo de la homoj, inspiri por legi beletron, provi taksu la ĉirkaŭantan mondon kaj krei la ŝancon por malkovro kaj pliprofundigo de literatura talento.

Pasintjare ni iom ŝanĝis la regulojn, enkondukis du apartajn kategoriojn: por verkoj en Esperanto kaj en la pola. Ni ankaŭ ne transprenos la kopirajton por la verkoj, kiu restos ĉe la aŭtoroj.

La literatura teksto devas esti memstare verkita, prezentita en Esperanto kaj/aŭ la pola; ĝi devas esti maks. 3 paĝojn longa (po 1800 karaktroj). La verko devas esti antaŭe ne publikigita. Ni petas, ke via verko havu originalan titolon („Perditaj en la reto” estas nur la konkursa temo).

Vian tekston vi povas sendi ĝis la 31-a de aŭgusto 2025 (okaze de poŝta sendo, gravas la stampo-dato).

La verkon donu al ni per unu el la du manieroj:

sur kompaktdisko, persone en CLZ ĉe la strato Warszawska 19 en Bjalistoko – Esperanto-Libraro en la horoj 13h00–17h00 aŭ senditan kune kun la subskribita aliĝilo/informa klaŭzo en koverto al la adreso: Bjalistoka Esperanto-Societo, 15-001 Białystok 1, skr. poczt. 67 kun la surskribo: Literatura konkurso — aŭ:

kiel tekstan dosieron en la formato .doc, .docx aŭ .odt al kroĉitan al retmesaĝo sendita al la adreso f14kp@ksiaznicapodlaska.pl (kune kun la subskribita kaj skanita aliĝilo/informa klaŭzo).

<https://espero.bialystok.pl/eo/15-a-literatura-konkurso-esperanto-ligas-homojn>

La konkursa rezulto estos anoncita la 12-an de decembro 2025 en la 26-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj.

Se vi havas demandojn, kontaktu nin retroŝte:

f14kp@ksiaznicapodlaska.pl

aŭ telefone: +48 85 741 50 85.



Zagubieni w sieci
Perditaj en la reto

Literatura Vivo

ISSN 2819-4861

Monthly Published by John Huang & Erika Godo in Mississauga, Ontario, Canada